

# EL POPOLA ĈINIO

中國報通

2000

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esp.

ŭ-19034/2000



Ĝi apartenas ne nur al Ĉinio  
Historiaj signoj (I)

# EL POPOLA ĈINIO



Festo de  
EPC 19




Gratulaj  
pentraĵoj  
por EPC 8



Historiaj  
signoj (I) 28

Amo de mal-  
juna usonano  
al Ĉinio 40



25  
Interesa  
festivalo  
de "Ruĝa  
Vesto"



- 3 **INTER NI**  
 4 **ORA JUBILEO DE EPĈ**  
 10 **50 JAROJ — EPĈ:**  
 EPĈ kaj mi en duonjarcento; Ĉu mi povas forgesi? Voĉo de maljunulo  
 14 **GRATULOJ AL LA ORA JUBILEO DE EPĈ**  
 15 **ESP-NOVAĴOJ**  
 16 "El Popola Ĉinio" kaj Esperantaj libroj  
 18 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**  
 Ĉinaj juro, juĝistoj kaj advokatoj  
 24 **POR KOMENCANTOJ:**  
 Postvivantino  
 34 Brodaĵoj de Shaanxi  
 35 **KURANTAJ AFEROJ**  
 36 **ORIGINALE VERKITAĴJ:**  
 Du poemoj  
 37 **SUR NIA LIBROBRETO:**  
 Libroj ricevitaj de EPĈ-redakcio kaj Ĉina Esperanto-Biblioteko  
 38 **EL ĈINAJ GAZETOJ**  
 44 Pri elektroprovizado en Makao  
 46 **JUNULARO:**  
 Amatoro de ekspediciado  
 48 Se memoro povus engreftiĝi  
 50 **POR VIA SANO:**  
 Saniga gimnastiko de Shen Junru (I)  
 51 **ĈINAJ POŝTMARKOJ:**  
 Memore al la signifoplenaj eventoj

## INTER NI

"El Popola Ĉinio" celebris sian 50-jaran jubileon. Iuj el niaj legantoj kaj perantoj honoris nin per sia ĉeesto de la festkunveno. La gastoj kaj redaktoroj kun ĝojo rememoris la pasintecon de la revuo kaj ĝiajn kontribuojn por la E-movado, mondpaco kaj amikeco inter la popoloj. Ili deziras, ke la perspektivo de Esperanto estu pli brila kaj la homoj pli feliĉaj. Pri nia jubileo legu la artikolon "Ĝi apartenas ne nur al Ĉinio" kaj ĝuu la koncernajn fotojn. Por la jubileo oni faris al ni belajn pentraĵojn. Ni publikigas ilin, por ke niaj legantoj kune kun ni aprezu ilin. En tiu ĉi numero ni daŭre publikigas gratulajn leterojn kaj memorigajn artikolojn.

En la pasintaj 50 jaroj ĉinaj arkeologoj malkovris multe da historiaj objektoj, kiuj manifestas la antikvan ĉinan civilizacion. En tiu ĉi numero ni konigas tiujn gravajn eltrovojn, kaj tion sekvas ankaŭ la aŭgusta numero.

La Red.



Renkontiĝo en Pekino  
 Foto de Liu Sigong

Okaze de la 50-jara jubileo de "El Popola Ĉinio" en majo 2000 renkontiĝis EPĈ-perantoj kaj -legantoj en Pekino. Ili partoprenis la festadon kaj vizitis Pekinon, Ŝanhajon, Nankinon kaj aliajn lokojn. Jen ili kun EPĈ-anino en la parko Ĉiela Altaro.

### EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
**Redaktata** de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

**Distribuata** de Distribua Fakto de "El Popola Ĉinio"

**Direktoro:** Wang Xifu

**Adreso:** P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

**Telefono kaj telefakso:** +86-10-6832 1808

**Retpoŝto:**

epc@china-report.com

**Hejmpaĝo:**

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

7[502]2000

# Ĝi apartenas ne nur al Ĉinio

Teksto de XIANG HONG

Fotoj de LIU SIGONG kaj ZHAO XI

**L**A 18-an de majo la redakcio de "El Popola Ĉinio" okazigis kunsidon por celebri la 50-jariĝon de la revuo kaj la aperon de ĝia 500-a numero. Inter la pli ol 200 partoprenantoj troviĝis s-ro Wan Guoquan, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kaj aliaj estroj de koncernaj ĉinaj registaraj departementoj, s-ro Chen Yuan, honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj fama ĉina lingvo-sciencisto, s-ro Zhang Qicheng, kunfondinto de EPĈ kaj ĝia iama ĉefredaktoro, pekinaj esperantistoj kaj amikoj novaj kaj malnovaj, ĉinaj kaj alilandaj.

Omaĝe al la jubileo s-ro Li Peng, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, faris surskribon: "Raportu Ĉinion, dissemu amikecon kaj bone eldonu El Popola Ĉinio." La surskribo montras la subtenon de la ĉina registaro al la E-movado, tio kompreneble ĝojigis kaj kuraĝigis la kunsidantojn, laborintojn kaj laborantojn de la redakcio de EPĈ.

Esperantistoj kaj Esperantaj organizoj el pli ol 50 landoj sendis al EPĈ-redakcio gratulajn leterojn aŭ artikolojn.

Festparolis s-ro Zhao Changqian, vicdirektoro de la Fremdlingva Eldona Buroo (FEB), kiu alte taksis la kontribuon de EPĈ por E-movado kaj diskonigo de Ĉinio. Festparolis ankaŭ s-ro Ragnar Baldursson, diplomato de la islanda ambasadejo en Ĉinio, s-ro Gianfranco Polerani,



Zhao Changqian donas festparoladon.

komitatano de UEA kaj estrarano de la Itala Esperanto-Federacio, f-ino Sabira Ståhlberg, konsilanto de TEJO kaj redaktoro de "Kontakto", kaj s-ro Stanisław Mandrak, prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio.

La E-sekcio de la Ĉina Radio Internacia, kiu multjare kunlaboris kun EPĈ, deklamis la poemon "Ho, franjo!" verkitan de akademiano Xie Yuming por la jubileo.

En sia festparolado s-ro Wang Xifu, direktoro de EPĈ, dankis ĉiujn, kiuj helpis la redakcion. Aparte li bonvenigis dekelkajn alilandajn samideanojn el Argentino, Danlando, Italio, Belgio, Portugalio, Hispanio, Pollando, Francio kaj Finnlando, kiuj venis al Ĉinio por ĉeesti la kunsidon.

Dum sia restado en Ĉinio tiuj fremdlandaj amikoj renkontiĝis kun redaktoroj de EPĈ kaj vizitis, krom Pekino, ankaŭ aliajn ĉinajn urbojn. Kiel reprezentantoj de la legantoj, ili



Wang Xifu donas festparoladon.

montris siajn profundan amon al EPĈ kaj sinceran amikecon al la ĉina popolo. Kiam ni brakumis la vizitantojn E-amikojn kaj kiam ni legis leterojn de niaj legantoj, ni sentis la magnetan forton de EPĈ faciligi interkompreniĝon kaj elimini fremdecon. Pro tio ne vanis nia formika laboro.

Retrorigardante la pasintan gloron, ni konscias, ke atendas nin pli peza tasko. Sekve de pliprofundigo de la reformado, Ĉinio eniros en la mondan ekonomian cirkuladon. Ĉu la redakcio de EPĈ povos garantii la kvaliton de la revuo kaj venki la eventualan financan malfacilon? Tio estas nepre solvenda problemo. Tamen ni ne perdas la kuraĝon kaj memfidon, konsciante, ke ni ne estas solecaj — la tutmondaj samideanoj subtenas kaj subtenos nin, kiel diris s-ro Chen Yuan: "El Popola Ĉinio apartenas ne nur al la ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ al ĉiuj pacamaj popoloj kaj diverslandaj esperantistoj." ■

## Festparolado de Chen Yuan

Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj fama ĉina lingvo-scienisto

Estas granda ĝojo por mi gratuli la oran jubileon de "El Popola Ĉinio". Permesu al mi paroli unue Esperante kaj poste nacilingve por esprimi miajn korajn bondezirojn al la gastoj, venintaj de malproksime por festi kune kun ni la jubileon. Cetere, mi faras tion por montri al la publiko, ke la artefarita lingvo Esperanto estas la plej efika komunikilo, ĝi povas esprimi ĉian penson kaj ĉian senton de la homa socio.

La revuo "El Popola Ĉinio" estis fondita de niaj pioniroj antaŭ 50 jaroj. Tiam, ne longe post la liberiĝo de nia urbo Pekino, la infanoj kaj maljunuloj kantis surstrate: "Hela estas la tago de la liberigita regiono..." Ĝuste en tiu hela tago aperis "El Popola Ĉinio". Tiam ni estis ankoraŭ junaj kaj ne sciis, ke en la mondo

ne ĉiu tago estas hela: iafoje pluvas, iafoje neĝas, iafoje frostas, iafoje eĉ ŝtormas. Sed nenion ni timis, ni daŭrigis la vojon malgraŭ ĉiaj malfaciloj. Ĝuste en tia malfavora situacio la redakcio de "El Popola Ĉinio" senŝanceliĝe marŝis ĉiam antaŭen, ĝis hodiaŭ.

50 jaroj estas nur palpebra momento en la longa rivero de Historio, sed tiom da tempo por Esperanta revuo signifas multe — oni devas sinofere kaj pene labori kaj venki multajn neimageblajn malfacilojn. Tion ni faris, nia "El Popola Ĉinio" faris. Ni atingis nian celon post 50 jaroj da malfacila laborado. Dum tiuj 50 jaroj ni esperantistoj kune kun nia popolo serĉis vojon, vojon ĝustan kaj kondukantan al bela socio sen perforto, sen malamo, pleniĝanta je libereco, demokratio kaj bela harmonia

vivo. Post multaj malsukcesoj kaj sukcesoj ni finfine trovis la ĝustan vojon, t.e. la socialisman vojon kun ĉinaj karakterizaĵoj. Ni realigos tiun belan idealon, kiun nia majstro Zamenhof revis antaŭ pli ol 100 jaroj.

Dum la pasintaj 50 jaroj nia "El Popola Ĉinio" ludis rolon de kultura ambasadoro. Al aliaj popoloj ĝi konigis la novan vivon de nia popolo kaj ĉiujn aspektojn de nia juna respubliko, ke ĝi interkomunikigis la ĉinan kaj aliajn popolojn en la kultura kaj aliaj kampoj. Ĝi bone ludis tiun rolon. Tial, en tiu senco kaj nur en tiu senco, "El Popola Ĉinio" apartenas ne nur al la ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ al ĉiuj pacamaj popoloj kaj diverslandaj esperantistoj.

Fine mi deziras al "El Popola Ĉinio", ke ĝi estu ĉiam floranta, ĉiam juna kaj ĉiam energioplana.



## Festparolado de Zhang Qicheng

Honora membro de UEA kaj iama ĉefredaktoro de EPĈ

Antaŭ 50 jaroj, t.e. en la jaro 1950, mi interkonsiliĝis kun sano Hujucz pri aperigo de E-revuo. Dank' al la apogo de nia popola registaro, la unua numero de la revuo nomata "El Popola Ĉinio" aperis en majo de tiu jaro.

Nun, post 50 jaroj, mi ege maljuniĝas, sed nia revuo ne maljunas, male, ĝi plijuniĝas, ĉar la juna generacio de e-istoj aliĝis

al nia vico. La gejunuloj donas al la revuo freŝan Junecon, plibeligas ĝin aspekte kaj pliriĉigas ĝin en have. Sekve, nia revuo estas ŝatata de la legantoj.

Hodiaŭ ni kunsidas ĉi tie por jubilei la 50-jariĝon de la revuo EPĈ. Mi esperas, ke post pluraj jardekoj kaj eĉ jarcentoj EPĈ festos sian centjariĝon, ducentjariĝon kaj eĉ plu. Mi kredas,

ke mia espero ne restos nur espero, sed centpocente efektiviĝos. Do, lasu min gratuli niajn karajn gekolegojn de

EPĈ kaj bondeziri, ke la revuo havu pli belan estontecon kaj akiru pli brilajn sukcesojn.

Je la fino de mia parolado mi dankas kaj salutas vin ĉiujn.



## Festparolado de Ragnar Baldursson

Konsilanto de la islanda ambasadorejo en Ĉinio

En la nomo de Islanda Esperanto-Asocio mi salutas vin,

portante al vi varmajn bondezirojn de la islandaj esperantistoj okaze

de la kvindekjariĝo de la revuo "El Popola Ĉinio".

Kvindek jaroj ja estas longa vivtempo de Esperanto-revuo. Tioma vivdaŭro de EPĈ devas esti dankenda al diversaj faktoroj, inter kiuj sen ia dubo alte staras

## ● ORA JUBILEO DE EPĈ

la riĉ-enhava prezento de la diversaj aspektoj de la ĉina kulturo, kaj la alta nivelo de Esperanta stilo, kio estas elstara pruvo pri la profunda respekto, kiun havas la redakcio de EPĈ por la Internacia Lingvo.

Ne eblas supertaksi la konstruan valoron de tia revuo, kia estas EPĈ. Mi diras "konstruan", ĉar ĝuste tian la revuo havas: ĝi konstruas ponton inter kulturaj mondoj, la orienta kaj la okcidenta, kiuj dum jarcentoj estis vaste malsimilaj kaj malmulte konis unu la alian. Nuntempe tiuj mondoj ĉiam pli interproksimiĝas, i.a. danke al tia konstruanto de pontoj kia estas EPĈ. Eble ni eĉ povas diri, ke ponto konstruata per neŭtrala internacia lingvo, kia estas Esperanto, estas tiom pli forta kaj tenema, ĉar ĝin firmigas idealismo, kiu bele kongruas kun la deziro diskonigi kulturajn valorojn sentrude kaj egalisme. Estas ja notinde, ke ĉiam pli oftigiĝas konkretaj pruvoj pri

kultura reciprokeco sur la paĝoj de EPĈ.

Por mi persone la etoso de EPĈ estas aparte intima. Jam kiel junulo mi konatiĝis kun la revuo en mia hejmlando, Islando.

Kiel studento en la Pekina Universitato mi baldaŭ renkontis pekinajn esperantistojn, i.a. tiujn, kiuj rekte koncernis sin pri la preparado kaj eldonado de la revuo.

Poste, regante la ĉinan lingvon, ankaŭ mi mem komencis okupi min pri diskonigo de la ĉina kulturo en mia lando, Islando, tradukante ĉinajn verkojn en la islandan lingvon, i.a. la Analektojn de Konfuceo.

Tial mi emas iel konsideri min kiel kunlaboranton de EPĈ, eĉ en duobla senco: nin interligas du lingvoj: Esperanto kaj la ĉina, kaj ambaŭ iel kunfluas en kultura kunlaboro, kiu havas komunan celon: konstrui ponton inter kulturmondoj malsimilaj, kulturmondoj, kiuj tamen havas komunajn homajn similecojn, kiuj

sin rivelas je ĉiam kreskanta interkompreno.

Al tio iusence ligiĝas ankaŭ la fakto, ke la fondo de la Ĉina-Islanda Kultur-Societo havas siajn radiokojn en la komuna intereso de kelkaj junaj islandaj esperantistoj, kiuj ekkoniĝis kun "El Popola Ĉinio" antaŭ pli ol 25 jaroj.

Mi ripetas miajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de la kvindekjariĝo de la kultura revuo "El Popola Ĉinio".

Ĝia graveco eksterlande kiel fidinda, belaspekta kaj varieca informilo pri la kultura vivo kaj la kulturaj tradicioj de la ĉina popolo estas nesupertaksebla.

Kresku kaj floru "El Popola Ĉinio" dum la dua kvindek-jara etapo de sia vivo.



## Festparolado de Gianfranco Polerani

Komitatano de UEA kaj estrarano de la Itala Esperanto-Federacio

Mi estas honorita porti al la organizantoj de kaj al vi ĉiuj partoprenantoj en tiu ĉi solena kunveno la salutojn de la prezidento, estraranoj kaj komitatanoj de la universala organizo de nia Esperanta movado.

Ĝoje mi deziras kore gratuli la redaktorojn kaj ĉiujn kunlaborantojn de la belega ĉina revuo "El Popola

Ĉinio". Ĝi regule aperas kaj ekde jam 50 jaroj estas disvastigata tra la tuta mondo kaj ege aprecata de la legantoj, ĉar ĝi ĉiam estas belaspekta kaj riĉa je multaj informoj, novaĵoj kaj interesaj humuraĵoj de la granda ĉina lando.

UEA deziras, ke la rilatoj kun "El Popola Ĉinio" kaj la tuta ĉina esperantistaro estu ĉiam

pli fortaj, intensaj kaj fruktodonaj por disvastigi nian belan komunan internacian lingvon, kiu faciligas la amikecajn interrilatojn trapasante ĉiujn barojn geografiajn, politikajn, etnajn, religiajn, lingvajn ktp.

Korajn kaj amikajn salutojn al vi ĉiuj!



## Festparolado de Sabira Ståhlberg

Konsilanto de TEJO, redaktoro de "Kontakto" kaj doktorino pri orientaziaj lingvoj

Se oni kalkulas laŭ homaj vivojaroj, 50 jaroj estas

konsiderinda kaj respektinda aĝo. Homo atinginta tiun aĝon jam

akiris multan sperton kaj saĝon. Por revuo 50 jaroj estas laŭdinda kaj salutinda atingo. Speciale en Esperanto, la unika kaj ĉiam progresanta internacia lingvo, kiu estas parolata en la tuta mondo, la atingoj de EPĈ estas multe gratulindaj kaj vaste celebrindaj.

Tra la jaroj EPĈ ĉiam troviĝis inter la unuaj kaj plej gravaj revuoj en Esperanto. Ĝia internacia legantaro estas vasta kaj troviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. Tiom vastan publikon neniu nacilingvaj revuoj povas atingi, eĉ ne tiuj, kiuj havas multe pli grandan nombron da abonantoj ol EPĈ aŭ pli famas sur la mondaj merkatoj. Ĉiu leganto de EPĈ rakontas al sia familio, siaj amikoj kaj siaj samideanoj pri tio, kion li legas. Foje li eĉ tradukas artikolojn el EPĈ en sian nacian lingvon kaj publikigas en lokaj gazetoj. Tiel la informoj kaj la famo de EPĈ atingas multe pli grandan nombron da homoj, en multe pli da landoj kaj kun multe pli granda efiko ol pluraj famaj nacilingvaj revuoj. Ĝi rolas kiel vera ponto inter la popoloj kaj homoj de la tuta mondo, kaj antaŭenigas veran, senperan interkompreniĝon kaj amikecon inter ili.

Esperanto ludas ĉiam pli gravan rolon en internacia

komunikado. Mi nur menciu, ke en la Interreto troviĝas kelkaj milionoj da Esperantlingvaj paĝoj. Ekzistas centoj da revuoj en Esperanto, eldonataj tra la mondo, pluraj radiostacioj kaj ankaŭ televidaj programoj.

Kiel 50-jarulo, EPĈ akiris multan saĝon kaj sperton dum la jaroj. Sed EPĈ ne ekripozas sukcesinte. Ĝi laboras por ĉiam renoviĝi. Ĝi estas kaj restas progresema kaj pri temoj, kaj pri ekstera aspekto. EPĈ tial, miaopinie, havas ne nur brilan pasintecon, sed ankaŭ brilan estontecon.

La ĉina kulturo kaj la ĉina socio havas antikvajn radikojn, sed estas malmulte konataj eksterlande. Ĉinio estas fremda, ofte eĉ stranga por eksterlandanoj. Ofte dum miaj studoj pri Ĉinio mi renkontis la opinion, ke ne eblas kompreni ĉinojn kaj Ĉinion. Tamen, esperantistoj legantaj EPĈn ne opinias tiel. Por ili Ĉinio estas jam konata, ĉar ili ĉiumonate sekvas la okazaĵojn en la lando.

Ili estas informitaj pri la progreso kaj sukcesoj de la lando, kaj ili estas grandaj amikoj de Ĉinio. Tiel, do, EPĈ per sia agado kaj siaj multflankaj informoj gajnis vastajn amikaron kaj komprenon por Ĉinio kaj ĝia evoluo. EPĈ estas nekompareble grava ambasadoro por sia lando.



En Esperantio, EPĈ estas grava revuo kun multaj spertoj kaj vasta subteno. Ĝi estas unu el la fundamentoj de la movado.

Tial, mi volas kore gratuli al EPĈ kaj kuraĝigi ĉiujn ĝiajn kunlaborantojn daŭrigi ankoraŭ longe la agadon por la revuo, kiu troviĝas en ĉies koro, kaj kiu ludas tiom gravan rolon por la Esperanto-mondo kaj por ĝia lando, Ĉinio.

## Festparolado de Stanisław Mandrak

Prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio

Okaze de la ora, 50-jara jubileo de via agado akceptu de la tuta esperantistaro aliĝinta al Pola Esperanto-Asocio tutkorajn bondezirojn.

Dank' al via revuo multe da homoj konatiĝis kun via belega lando kaj ĉina Esperanta movado.

Via porpaca kaj poresperanta multjara laboro estas vaste konata en la Esperanta mondo.

Nome de niaj anoj ni deziras al vi sukcesojn en la plua laboro, multe da kontento kaj prospero. En via persona vivo ni deziras al vi kaj viaj familianoj multe da sano, feliĉo kaj sukceso.

Estas granda plezuro por mi saluti vin el la lulilo de Esperanto, el lando, kie antaŭ pli ol 110 jaroj naskiĝis Esperanto. Ĉu 110

jaroj por la lingvo signifas multe? Verdire ne tro. Sed por la internacia neŭtrala lingvo tio estas grava signifa periodo. Kaj en tiu ĉi periodo preskaŭ duonon ekzistas via revuo.

Kun via revuo mi persone ankaŭ ligiĝas. Antaŭ preskaŭ 20 jaroj, tuj poŝt mia esperantistiĝo mi konatiĝis kun via gazeto. De unua momento ĝi interesis min. Ĝi estis unu el kelkaj E-gazetoj, kiujn oni povis aĉeti en gazetkioskoj en Pollando. Multe da jaroj mi abonis ĝin kaj legis pri via belega lando kaj pri E-movado.

Leginte la artikolojn, mi revis pri iama vizito en Ĉinio. Kiam pasintjare mi interparolis kun s-ro Wang Ruixiang dum la UK en Berlino pri via jubileo, mi ne povis

pensi, ke mia multjara revo realiĝos en la jubilea jaro 2000. Nun tio realiĝas.

Mi volas danki vin pro via invito kaj pro via akcepto en via belega lando kaj ĉefurbo.

Mi volas peti vin akcepti la varmajn salutojn el fora Pollando.

Mi pensas, ke viaj kontaktoj kun la lulilo de Esperanto estos same fortaj kiel ĝis nun. La 500-a numero de via gazeto montras la bonan vojon, kiun travivis E-movado en via lando subtenata de la ŝtato.

Mi deziras al via tuta redakcio multe da bonaj artikoloj kaj miloj da legantoj.

Vivu EPĈ!

Vivu Esperanto!





S-ro Chen Xiwei, diplomita el la pentrarta fakultato de ĉina arta instituto en 1951. Iam li laboris kiel belarta redaktoro de EPĈ kaj poste profesoro pri ĉinstila pentrarto kaj kaligrafio en la Ĉina Centra Nacimallimulta Universitato. Liaj pentraĵoj de pejzaĝoj enkorpiĝas vivan etoson. Liaj kaligrafiaĵoj plene montras lian talenton.

## Gratulaj pentraĵoj por EPĈ

S-ro Guo Feng, membro de la Centra Pentrarta Akademio. Liaj verkoj de floroj kaj birdoj varme pri-kantas la naturon.







S-ro Wang Lin, pentristo de floroj, birdoj, pejzaĝoj kaj homoj. Liaj verkoj estis plurfoje premiitaj en pikturaj ekspozicioj en- kaj eksterlandaj.



S-ro Liu Shaoyong, pentristo preferanta pentri florojn, birdojn kaj pejzaĝojn. Li penas enkorpigi en siajn verkojn poeziecon kaj strebas al renovigo kaj diverseco de siaj verkoj.



S-ro Mai Hongjun, huj-naciano, naskita en 1969 en Henan-provinco. Liaj pentraĵoj de pejzaĝoj karakteriziĝas per simpleco, natureco kaj kvieteco.

# EPĈ kaj mi en duonjarcento

Estas tre feliĉe, ke tuj kiam mi komencis lerni Esp-on, mi kontaktiĝis kun EPĈ kaj havis nedisigeblajn rilatojn inter ni. EPĈ pliriĉigis mian vivon. Ĝi akompanis min sur la vojo de esp-isteco, antaŭen marŝi kaj kreski.

de GUOZHU

**L**A ĉina Esp-movado havas historion jam de ĉ. jarcento. Dum la pasintaj cent jaroj, sub kiaj ajn malfavoraj cirkonstancoj kaj kiaj ajn malfacilaj kondiĉoj, la eldonado de ĉinaj Esp-revuoj, makroskope dirite, neniam interrompiĝis. Kaj, el tiuj Esp-revuoj, tiu kun eldonado-daŭro plej longa, numero-nombro plej multa, preso plej bona, influo plej granda, legantaro plej vasta kaj taĉmento de redaktoroj plej potenca, sendube estas EPĈ, kiu atingis, en majo de la kuranta jaro, la 50-jaran aĝon kaj 500-an n-ron. Tio estas rekordo fierinda por ĉinaj esp-istoj. Tio estas granda frukto elkulturita de pluraj generacioj da laborantoj per penega kunlaborado. Tio estas grava evento ne nur en la ĉina, sed ankaŭ en la internacia Esp-movado. Kia ĝojiga kaj celebrinda afero!

Estas tre feliĉe, ke tuj kiam mi komencis lerni Esp-on, mi

kontaktiĝis kun EPĈ kaj havis nedisigeblajn rilatojn inter ni. EPĈ pliriĉigis mian vivon. Ĝi akompanis min sur la vojo de esp-isteco, antaŭen marŝi kaj kreski.

Mi estas fidela leganto de EPĈ. Escepte nur de la inaŭgura n-ro, mi serioze legis multajn n-rojn de EPĈ, ekde la 2-a ĝis la plej nova surreta. Komence ĝi estis en formato de oktavo, sen kovrilo, ofte kun bildoj de lignogravuraĵoj kiel ilustraĵoj. Poste, ĝi estis en deksekonfolia formato, 24 paĝoj, malofte kun koloraj bildoj. Pli poste, tiuj numeroj, kiuj aperis depost 1957 ĝis la nuntempa eldono sur interreto, kiun mi ofte legis, havas preskvaliton pli kaj pli bonan kaj enhavon pli kaj pli riĉan.

Mi estas fidela malnova abonanto de EPĈ. Ekde 1957 mi abonis la revuon, seninterrompe ĝis hodiaŭ.

Mi estas kolektanto kaj konservanto de EPĈ, posedante preskaŭ kompletan de EPĈ, malofte videblan inter popoloj en Ĉinio. Dum la katastrofa jardeko (1966-1976), pro la kolektado de EPĈ, mi eĉ suferis neleĝan priserĉadon en mia loĝejo. Tamen, eĉ en tiaj suferoj mi havis nenian penton pro mia amo al EPĈ.

Mi estas kontribuanto al EPĈ. Mia kontribuado unuafoje aperis en n-ro 2/1959 de EPĈ. Poste, miaj tradukoj aperadis

intermite de la 60-aj ĝis la 90-aj jaroj de la lasta jc. Kaj eĉ nun, en la nova jc. mi daŭre sendas mian kontribuadon. En la tempo de la 60-aj jaroj lastjarcente ĝis antaŭ la kultura revolucio, miaj kontribuadoj aperis en ĉiu n-ro de EPĈ kaj iufoje eĉ 3 pecoj en sama n-ro! Tiam EPĈ tre malofte publikigis la nomon de tradukinto, sed tamen publikigis la mian, eĉ pli ol unu fojon. Tio ege kuraĝigis min kaj en la n-ro 2/1963 EPĈ publikigis ankaŭ la foton pri mi kaj aliaj s-anoj festantaj Zamenhof-feston.

EPĈ tiel multe helpis al mi en mia lernado de Esp-o, ke mi eĉ ne povas ĉiom diri. En la unuaj jaroj de la 60-aj jaroj, EPĈ organizis la aktivadon "Kolektiva Tradukado", kies varbitoj dissemiĝis tra la tuta Ĉinio. Tio signifas por ni senpagan korespondan kurson. Anstataŭ mem verki aŭ traduki, veteranoj en la redakcio de EPĈ volonte elspezis dekoble pli multe da tempo por korekti niajn fuŝtradukojn plenajn de eraroj. Poste, ili publikigis la pli bonan kaj faris detalan resumon por gvidi nin en Esp-lernado. Ili ja celis progresigi nin en traduka praktikado.

Dum multaj jaroj EPĈ estis por mi la unika legaĵo, kiun mi zorgeme tralegis. Ne malofte okazis, ke preninte ekzempleron de EPĈ, mi detale legis, de la unua ĝis la lasta litero, faris notojn kaj je jarfino sendis al la redakcio kiel mian dankon la liston de preseraroj en la jarkolekto de EPĈ.

La zorgema tralegado de EPĈ,



La aŭtoro (staranta) rakontas pri siaj rilatoj kun EPĈ.



La aŭtoro (la tria de maldekstre en la antaŭa vico) kun partoprenantoj de E-seminario

precipe iuj ĝiaj rubrikoj ekz-e tiu pri ĉina literaturo verkita de Mei Zhi, multe riĉigis miajn sciojn. De tio mi lernis sciojn ne nur pri Esp-o, pri la arto de tradukado de la ĉina en Esp-on, tio ankaŭ pliriĉigis al mi komprenon pri kaj amon al la tradicia kulturo de mia patrujo. Tiel ĝermis en mi la ideo, ke mi ankaŭ dediĉu mian grandan forton al la granda laboro diskonigi la riĉan ĉinan kulturon per Esp-o. Tiel okazis poste la sindono al laboro de esp-igo de "Liaozhai" en ĝia kompleta teksto, kiu daŭris 30 jarojn. Pri mia tiu ĉi benediktana laboro EPĈ ankaŭ plurfoje raportis.

EPĈ donacis al mi multajn eldonaĵojn kaj memoraĵojn, ekz-e la memorkajero okaze de la 15-jara jubileo, la memorinsigno okaze de 35-jara jubileo, la indekso de EPĈ (1950-1983), kaj ĉiujare bildkalendaron kaj novjaran bk... Multaj el ili fariĝis valoraj esp-aĵoj, kiuj vekis envion

ĉe miaj Esp-amikoj.

En 1981 EPĈ eldonis la verkon de ĉina verkisto Lusin "Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero", esp-igitan de mi je memoro al la centa datreveno de lia naskiĝo.

En la 90-aj jaroj EPĈ, redaktita kun pli kaj pli evidentaj trajtoj, plimultigis diskonigon de Esp-o, Esp-movado kaj ĉinaj esp-istoj. Multaj el miaj Esp-amikoj tra la tuta lando aperis sinsekve sur la paĝoj de EPĈ. Mia longa verko "Ni Iru la Vojon Celitan" estis publikigita en n-ro 8/1994; poste, n-ro 11/1995 publikigis laŭdon de brazila leganto Sirio Silva pri ĝi. N-ro 10/1996 publikigis raportaĵon pri mi, kun foto-serio en du tutaj paĝoj, inkluzive tiun de mia tuta familio, sekve tiu ĉi n-ro fariĝis valora trezoro por mia familio.

Jaroj forfluis kaj multaj aferoj ŝanĝiĝis. Tamen EPĈ-membroj de malsamaj generacioj senescepte

donis al mi prizorgon, helpon kaj amikecon. Veteranoj ekz-e s-anoj Honfan, Venlo Fon, Tikos kaj Zensto per verda inko korektis miajn tradukojn de komencanto; gvidantoj de EPĈ-redakcio ekz-e Zhang Qicheng, Ilin, Hou Zhiping kaj Tan Xiuzhu donis al mi helpon, kaj la junaj kolegoj Wang Hanping kaj Sun Aijun havis kun mi trans-aga interkomunikiĝon. Ĉiufoje, kiam mi rememoris tiujn konatajn vizaĝojn, mi eksentis intimecon kaj varmon. Okaze de la 50-jara jubileo de EPĈ mi sincere dediĉis modestan poemeton Rimgratulo:

*El Popola Ĉinio kvindek-jara  
kun rikolto abunda, frukto  
kara!*

*Ni sendas al vi korajn  
bondezirojn:*

*Longe vivu kun glori  
neordinara!*

Mi kore bondeziras al EPĈ ĉiaman Junecon kaj senĉesan floradon! ■

# Ĉu mi povas forgesi?

de CARMEL MALLIA (Malto)

**A**NTAŬ cent jaroj, vidis la lumon la unua libro de Esperanto, kies aŭtoro, D-ro L. L. Zamenhof, kaŝante sian propran nomon, publikigis ĝin sub la pseŭdonimo "D-ro Esperanto". Estis humila verko, kiu per diversaj tradukoj rapide rondiris la mondon. Ĝi estis semo, nun jam kreskinta al arbo kun etendiĝantaj radikoj kaj kun branĉoj ĉiam multobliĝantaj kaj verdaj.

Por memori la centjariĝon, speciala kongreso okazis en la kultura palaco de Varsovio, Pollando, la lulilo de la internacia lingvo. Dum la bunta aktivado la kongresanoj partoprenis unu aŭ plurajn allogaĵojn, kiel ekzemple la kunsidojn de la ĝenerala komitat-kunveno, ktp. Mi, kiel reprezentanto de la malta societo, partoprenis kiel observanto. Ĉi tie en Malto ne estas facile atingi cent membrojn — cent membroj estas la minimumo por ke societo havu reprezentanton en la komitato de UEA — ne nur pro la malgrandeco de la insulo, sed ĉefe pro la florado de multnombraj societoj kaj asocioj diversspecaj. Do eble restos ĉiam revo por nia societo iam havi tiun plenan membron en la komitato de UEA. Ni devas kontentigi nin per observanto.

Okazis krome pluraj renkontiĝoj de specialigitaj kaj fakaj asocioj. Mi ne forgesas la kolosan balon, kiu daŭris ĝis frumatene. Kaj kion diri pri la

libroaĉetado? Oni devis envice atendi longtempe por tiu favoro. Miaflanke, mi ne sukcesis aĉeti el tiu libroplena salono.

Kaj ĉu forgesi la malfermon kaj la fermon de la kongreso? Ambaŭ vere imponaj, sed speciale la malfermo, kiun partoprenis diverslandaj ambasadoroj, krom la reprezentanto de la Unuiĝinta


Verkistoj, kies membro mi estas. Dum ĉi tiu kunveno mi prezentis al la sekretario de ties Asocio salutojn kun deziro al pli proksima kunlaboro, kiujn per mi sendis la Societo de Maltaĵ Poetoj.

En la kongresa universitato mi prelegis pri la malta literaturo kun akcento sur la malta poezio.

Sufiĉe multnombra estis la aŭskultantaro; kelkaj eĉ faris demandojn kaj petis pli da detaloj. Tio okazis eble pro la jam cirkulinta parolo pri la "Antologio de Maltaĵ Poetoj", kiun mi publikigis per la helpo de la Zagreba Esperanto-Federacio.

Sed la plej impona okazaĵo por mi persone estis ĝuste tiu en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof. Estis tempo por paŭzi sed

estis tempo por memori al mi la fruajn historion kaj de Esperanto kaj kompreneble de la vivo de Zamenhof. Dum la kunveno sur la Zamenhofa Placo impresis min tiu sole ploranta violono, kiu spirite transportis niajn sentimenton kaj penson al tiuj unuaj tempoj jam menciitaj supre. Kiom dolĉaj, kiom melankoliaj, estis la notoj de tiu violono, kiun mi ne povis vidi pro la homamaso, sub la arboj petolantaj malsekigi nin sub konstanta pluvo. Tamen la busto de Zamenhof rigardis nin, kiel kokino ameme prizorgas siajn kokidojn, kokidojn diversnaciajn, sekve diverslingvaj. Mi sentis, ke tiumomente Zamenhof unuigis nin ĉiujn per sia lingvo, per sia



La aŭtoro

Nacio. Meze de la podio, kaj flankitaj de la estraro, ŝtelis ĉies rigardon s-ro Malinowski, prezidanto de la pola parlamento kaj d-ro Zaleski-Zamenhof, nepo de la Majstro. Mi devas menci la salutvortojn senditajn de la malta ministro, d-ro Ugo Mifsud Bonnici, pri edukado kaj kulturo. Estis la unua fojo ke malta ministro interesiĝis fari tiun paŝon koncerne Esperanto-kongreson. Sur la podio, nia societo pere de mi apudiĝis aliajn reprezentantojn kaj bondeziris la kongreson. La partoprenantoj miris ke partoprenis 15 maltaĵ esperantistoj, kio proporcie ne estas malgranda nombro.

Menciindas ankaŭ la kunsido de la Asocio de Esperantistaj

homaranismo, la kerno de lia naskito. La solula voĉo de tiu violono miksiĝis kun la koloroj de la trempitaj flagoj kaj de la bukedfloroj dum tiu solena, silenta posttagmezo. Tiam inundis ĉiujn la ĝojo esti, eĉ se pormomente, en la majstra naskiĝloko.

Oni ne povis forgesi la tombon de Zamenhof. Kiel aliaj, mi iris tien unufoje, dufoje, perbuse tra irante straton "Ludoviko Zamenhof". La lasta aŭtobushaltejo situas ĝuste apud la stratindikilo portanta la vorton "Esperanto".

La tombon de Zamenhof, surigitan de simpla sed vere originala monumento, ornamas amaso da floroj elkore alportitaj de diverslandaj esperantistoj. Tute

apude staras alia monumento, tro malgranda por nomiĝi monumento; fakte ĝi estas simbola memoro al Lidja, gasmortigita en la koncentrejo Treblinka, kiun ni vizitis survoje al Bjalistoko.

Ĉi tie mi deziras rakonti du anekdotojn. Dum mia unua vizito al la Zamenhof-tombo, mi malsekiĝis per la subita pluvtorento. Mia ombrello bravis la senĉesajn, preskaŭ kolerajn, gutegojn, sed neniel servis al mi dum tiu somera semajno — tiom pluvis! Dum mia duafoja vizito al tiu juda tombejo, ĝuste apud la enirejo, mi vidis trakuri la korton katinon bone premantan povran museton tra la dentoj. Musoj ne estas inter miaj amikoj. En tiu printempa kvieto

posttagmeza, ĉirkaŭate de tombaro, mi sentiĝis senmova, senpova, surprizita, eĉ timema. Tio okazis nur dum kelkaj sekundoj. Tuj rideto ekfloris sur miaj lipoj; miaj paŝoj ekmalpeziĝis kaj mi foriris por denove enmiksiĝi tra la kongresa homamaso — alia speco de musoj — por ĝui la jam antaŭlonge fiksitajn programon.

Post ĉi tiu kolosa renkontiĝo, kiu dirus ke Esperanto ankoraŭ ne atingis sian celon? Iel, mi ne bedaŭris partopreni tiun kongreson centjaran, do unufojan en ies vivo. Kaj per Esperanto mi havis la okazon ankaŭ viziti Varsovion kaj Bjalistokon. Eble la unikan ŝancon en mia vivo! Tion certe mi ne povas forgesi. ■

# Voĉo de maljunulo

de LINHART RYZNAR (Ĉeĥio)

**K**VINDEK jaroj — duono de la jarcento kaj riĉa kroniko de la homaro kun paŝo ne nur antaŭen, sed ankaŭ reen. La tekniko prezentas potencan disvolviĝon, ebligas pli rapidan kontakton inter la homoj, sed ne alproksimigas ilin, male, la abismo inter ili profundiĝas.

Ni vivas ĝis nun akcepteble bone, sed kun malfido ni rigardas la mastrumadon de la Unuigita Eŭropo. Ni timas, ke la loĝantaro dividiĝos en la grupon de riĉuloj, kiuj regos la ekonomion kaj la landon, kaj la grandan grupon de proletoj, kiuj ne havos optimisman perspektivon.

Jam nun la inflacio prirabis nin pri la mono, kiun ni ŝparis por nia maljunaĝo. Tion mi kuraĝas skribi kiel preskaŭ

okdekjarulo, kvankam mia rento dum lastaj dek jaroj triobliĝis.

Mi apartenas al la malnovaj legantoj de via revuo. Antaŭ 50 jaroj aperis la unua numero. Ĝi ne estis revuo, tio estis gazeto presita sur ne tro bonkvalita gazet-papero. Hodiaŭ mi havas en la manoj vere luksan revuon, kiu konkuras kun ĉiuj aliaj per sia aspekto, per sia enhavo, per bona lingvo, per la kvalito de preso kaj papero.

Via revuo altiradis la interesulojn en nia Esperantomontro-fenestro, kiun ni havis. Jes, havis, sed nun dum la ŝanĝita situacio ne plu havas. En la jaro 1948 mi gvidis en la urbo la unuan kurson de Esperanto, aliĝis 32 personoj sen granda propagando. Mi instruis laŭ Ĉemetodo ne nur pro tio, ke ĝi estis bona, sed ankaŭ pro tio, ke mankis la lernolibroj. Senpage mi instruis, hodiaŭ pagas la studentoj

altajn sumojn por la kursoj de la angla lingvo. Ĝi fariĝu la reganta lingvo. Sed dum la Dua Mondmilito estis la germana, kiu povis savi la mondon, ĉar regis ĉe ni germanoj. Post la milito venis la rusa por solvi ĉiujn problemojn. Nun transprenis la ĉefan rolon — la angla, kaj kvankam ĝin subtenas potenca ŝtato kaj tekniko, ĝi ne venkos.

Ĉiu nacio estas fieraj je sia gepatra lingvo, egale ĉu granda aŭ malgranda. Kaj ĉiu nacio finfine batalos por ĝi.

Ŝerce mi diradis: "Se ni volas demokrate decidi, kiu lingvo fariĝu monda, do ni lernu la ĉinan, ĉar ĉinoj estas la plej multaj."

Sukceson al via lando, ne tiom gravas la momenta situacio, pli gravas la ritmo de la evoluo, kiu estas en la mondo prisilentata, sed kiun prezentas la paĝoj de "El Popola Ĉinio". ■

*En la lastaj monatoj venis al ni multaj gratulaj mesaĝoj de niaj legantoj. Pro limigo de spaco ni aperigis nur parton el ili. Gratulajn vortojn sendis ankaŭ aliaj samideanoj kaj ni aperigos ilin en la aŭgusta numero. Koran dankon al ili kaj ĉiuj aliaj.*

**La Red.**

Mi ne povas tuj trovi taŭgajn vortojn por gratuli la 50-jariĝon kaj la 500-an numeron de "El Popola Ĉinio", unu el la revuoj nun plej ŝatataj kaj subtenataj de konsciaj esperantistoj de la mondo. Tiel granda kaj profunda estas la emocio, kiun mi kunsentas kun vi en la koro ĉe tiu historia epoko atingita post longa batalado de vi por la gloro de Esperanto-movado en Ĉinio.

Kiam debutis EPĈ, mi estis preskaŭ 20-jara junulo kun la koro sentema al la drasta ŝanĝiĝo en la Orienta Azio pro la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Mi eksciis Esperanton tuj post la kapitulaco de la militista registaro de mia lando Japanio, kio do signifas ke mia esperantisteco kreskis kun serioza interesiĝo al la disvastiĝo de nia lingvo en la aziaj landoj, kiuj sin liberigis de la jugo de koloniismo kaj agresaj militoj. Ĝuste en tiu socia fono mi unuafoje foliumis paĝojn de EPĈ, kiu sin prezentis tiel konvinke pri la prestiĝo de E-movado en la nova Ĉinio.

Pasis 50 jaroj kaj mi povas supozi, ke dum tiu tempodaŭro vi ne ĉiam marŝis sur bele pavimita vojo sed ofte aŭ zigzagis en densa arbaro aŭ restis lacaj sur dezerto. Vi tamen ne estis venkitaj de ĉio, kio antaŭ vi obstrukce staris. Kaj nun vi troviĝas en la granda aplaŭdo de samideanoj de la mondo, kiuj tiel sincere gratulas vin pri la meritplena atingo fare de via 50-jara penado.

En la kunsidoj por legantoj de EPĈ, kiun vi konstante aranĝis en ĉiu grava evento de esperantistoj, mi ĉiam ĉeestis, esprimis opiniojn

kaj faris proponojn rilate al la redaktado kaj distribuado. Vi tiam vere sincere aŭskultis min kaj nepre pristudis la problemojn montritajn de la ĉeestantoj inkluzive tiujn de mi mem. Mi ofte diris ke vi faru la revuon pli internacia disponigante paĝojn al elstaraj samideanoj de la mondo. Kaj mi nun agrable ĝuas en la revuo iliajn kriterie altajn verkojn. Mi ofte proponis aperigi pli multe da artikoloj, kiuj rilatas al E-movado kaj en Ĉinio kaj en la tuta mondo, por ke la revuo estu unuavice por esperantistoj. Kaj mi nun konstatas, ke priesperantaj artikoloj okupas la revuon en pli granda proporcio ol iam ajn antaŭe. Mi ofte kun kritiko deziris plibonigon de distribua sistemo de la revuo. Kaj mi nun aŭdas preskaŭ neniun plendon de la legantoj, kies abonon mi peris.

EPĈ estas por mi tia gazeto, ke mi kvazaŭ sentas spirojn kaj korbatojn de la samideanoj en la redakcio. Fakte mi persone konas ilin kaj konstante interparolas kun ili aŭ rekte aŭ rete.

Nun al vi ĉiuj mi denove esprimas la plej sincerajn gratulojn en la nomo de mi mem kaj ankaŭ de mia forpasinta edzino Takeuti Tomiko, unu el la plej fidelaj legantoj de la revuo, kaj bondeziras al vi pli da sukceso por la venontaj tagoj de nia movado en la tuta Azio kaj la mondo.

**Takeuti Yosikazu, vicprezidanto de Japana E-Instituto, vicprezidanto de KAEM kaj Komitatano de UEA**

Per la revuo "El Popola Ĉinio", ekde la unuaj numeroj, vi intense raportas pri la Esperanto-movado en via lando. Dume EPĈ donas bildon pri la evoluo en Ĉinio, tiel kiel aŭtoritatoj deziras prezenti ĝin.

Via lando dum tiuj 50 jaroj trapasadis streĉajn evoluojn kaj ŝanĝojn. Tio ne finiĝis; ankaŭ nuntempe la ĉina socio funde ŝanĝiĝas. Se ni iomete scias pri tio, la kaŭzo estas ofte ke ni tralegadas kaj trarigardas la artikolojn kaj bildojn en EPĈ.

**Ans Bakker-ten Hagen, prezidanto de "Esperanto Nederland"**

Mi tutkore gratulas vian memorfeston, kiu estas historia okazaĵo en nia Esperantujo. Vere EPĈ estas unu sola bela gazeto en Esperantujo, kio estas fieriĝo eĉ por koreaj esperantistoj. Persone, mi firme kredas, ke la movado de Ĉinio certe

progresos kaj kontribuos por la tutmonda movado. Mi esperas, ke via jubilea festo estos turnopunkto por via plia disvolviĝo.

**LEE Jung-kee, prezidanto de Seula E-Kulturcentro**

La esperantista societo de urbo Pazarĝik de Bulgario jam plurajn jarojn ricevas "El Popola Ĉinio" kaj niaj anoj kun intereso legas ĝin. Pere de ĝi ni konatiĝas kun la socikultura vivo de via lando, kun ĝiaj naturaj belaĵoj kaj miljara historio, kun la E-movado en via lando. Tial ni kunĝojas pro la 50-jariĝo de EPĈ kaj ĝia 500-a numero — du ege gravaj datrevenoj.

Sincere kaj samideane,

**Grozdenka Filipova kaj Petko Arnaudov, prezidanto kaj sekretario de la esperantista societo de Pazarĝik**

## ĈINIO

● La 21-an de aprilo s-ro Abdel Fattah Ezzeldin, ĉefkonsulo de Egiptio en Ŝanhajo, Ĉinio, vizitis Nankinon, ĉefurbon de Jiangsu-provinco, kaj intervidiĝis kun lokaj e-istoj. Ambaŭ flankoj



La ĉefkonsulo (la dua de dekstre)

konigis sian E-movadon, proponante starigi asocion por amikeco de ĉinaj kaj egiptaj e-istoj, cele akceli interŝanĝojn kulture kaj komerce de la du landoj pere de Esperanto.

(Zhuang Qixiong)

● Dank' al Esperanto e-istoj el la urbo Zaozhuang, Shandong-provinco, Cui Guoqing kaj rusa e-istino Tanja enamiĝis unu al la alia kaj, helpate de la Zaozhuang-a E-Asocio, okazigis sian geedziĝan ceremonion la 6-an de majo. Dum la nupto oni uzis Esperanton kaj la ĉinan lingvon. La prezidanto de la



Cui Guoqing kaj lia novedzino

asocio estis atestanto de ilia geedziĝo kaj vicprezidanto de la asocio voĉlegis la gratulajn mesaĝojn de ĉinaj kaj alilandaj e-istoj kaj E-organizoj. Tion raportis lokaj TV-stacio kaj ĵurnaloj. (Liu Chunyan)

## ĈEĤIO

● Ĉeĥa poŝto denove propagandas Esperanton rekte ĉe poŝtoŝtanco de Straznice, distr. Hodonin, per porokaza esperantlingva afrankmaŝinstampilo dum tagoj 25/04 — 31/07/2000. Je la koncerna kliŝeto estas dulingva teksto: "ESPERANTO SEKCIO 31 JARA

1969 2000 La espero". Aŭtoris ĝin jam tradicie, konata Praga duopo: laŭ projekto de inĝ. ark. Karel Kuca, ĝin majstre gravuris s-ro Karel Pavlicek. Pluajn informojn vi povas ricevi ĉe: Esperanto, poŝtkesto 36, CZ-696 62 Straznice, Ĉeĥio.

(Vladislav Hasala)

## FRANCIO

● La senprofitcela asocio "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" fondita en 1951 posedas kastelon Gresillon kun 18-hektara parko. Ĝi organizos diversgradajn E-kursojn en somero 2000: de la 15-a ĝis la 21-a de julio; de la 24-a ĝis la 29-a de julio; de la 31-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto; de la 7-a ĝis la 12-a de aŭgusto; de la 14-a ĝis la 19-a de aŭgusto. Kosto de ĉiu staĝo: 180 FF. Aliĝo al la Asocio: 50 FF. Infanoj sub 16 jaroj — entute: 50 FF. Manĝoj kaj loĝado estas aldonaj laŭ aranĝo. Informoj haveblaj ĉe: Paulette Naulet, Francio.

Telefono kaj fakso: 02.41.825522.  
(Kultura Esperanto-Domo)

## GERMANIO

● La 23-a Somera Esperanto Feria Tendaro (SEFT) okazos en Campingplatz am Dreetzsee, Germanio, de la 5-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2000. Kondiĉoj: memprizorgo (tendo, manĝoj, tendeca programo), surloke oni povas lui kabanojn, kontaktu skribe aŭ telefone la tendecan oficejon. Programo: migradoj tra la naturo, ekskursoj, kafoklaĉoj kaj vesperaj kunvenoj, prelegoj, ĉiuvesperaj fabelhoroj, banado en diversaj puraj lagoj ktp. (eblas bani sin normale aŭ vestite en la tuta regiono). La SEFT-komitato donas informojn pri detaloj skribaj: Eckart Raabe, Staakener Heuweg 1, D-14612 Falkensee; Thomas Raabe, Wielandstrasse 14c, D-14656 Brieselang; thora.brie@t-online.de. telefonaj: Astrid Weller, Sandweg 38, D-17348 Woldegk, telefono: 03963/210124 aŭ 03963/211999; Werner Pfennig, Uns Husung 29, D-17034 Neubrandenburg, telefono: 0395/4221398.

(Werner Pfennig)

## JUGOSLAVIO

● Esperanto-Societo en Senta eldonis du poŝtkartojn okaze de la 85-a UK en Tel-Avivo kaj de la datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

## MADAGASKARO

● La Dua Esperanto-Kongreso de la Hinda Oceano kaj Orientafrikaj Landoj okazos en Antananarivo, Madagaskaro de la 24-a ĝis la 26-a de aŭgusto 2000. Temo: Esperanto kaj Turismo. Pliajn informojn petu al Malagasa Esperanto-Asocio, Boite Postale 3171, 101-Antananarivo, Madagaskaro.

(UEA)

# "El Popola Ĉinio" kaj Esperantaj libroj

La internacia Esperanta rondo havas bonan tradicion: ĉiuj landoj ĉu grandaj ĉu malgrandaj esperantigas kaj publikigas siajn plej bonajn verkojn kaj interŝanĝas ilin. Ankaŭ Ĉinio tion faras, precipe post la fondiĝo de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, ni dediĉis nin al tiu tasko.

de LIU LING\*

**D**ISVASTIGO de Esperanto ne povas disiĝi de libroj. Diverslandaj esperantistoj ĉiam alte taksas eldonadon de libroj. La redakcio de "El Popola Ĉinio" eldonis, krom la gazeto, ankaŭ Esperantajn librojn. La libroj eldonitaj en 1952 kaj 1953 temas pri noveloj kaj poemoj, kiuj estis publikigitaj en la gazeto, kiel "Nova Afero Nova Maniero", "La Plej Forta Voĉo de la Paco" kaj "La Feliĉo". De 1957 ĝis 1965 ni la unuan fojon eldonis dikajn Esperantajn librojn ĉiu kun kelkcent mil vortoj, kiel "Ĉina Antologio (1949-1959)" kaj "Noveloj de Lusin". Pro manko de Esperanta eldonejo, tiam "El Popola Ĉinio" devis kunlabori kun la Fremdlingva Eldonejo. Personoj el la Ĉina Esperanto-Ligo kaj "El Popola Ĉinio" tradukis en Esperanton tekstojn transdonitajn de la Fremdlingva Eldonejo. Tiamaniere ni publikigis literaturajn verkojn, kiel "Aŝma" kaj "Rakontoj pri Fantomspitantoj"; librojn pri fundamentaj scioj, kiel "Konciza Geografio de Ĉinio" kaj "La Akupunkturo kaj Kaŭterizo de Ĉinio"; kaj librojn pri filozofia teorio, kiel "Pri Praktiko" kaj "Pri Kontraŭdiro". Dume ni publikigis ankaŭ bildlibrojn kaj poŝtkartojn, kiel "Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko", "Pejzaĝoj de

Ĉinio" kaj "El Ĉina Fotografia Arto"; kaj bildrakontojn, kiel "Mi Volis Viziti Lernejon", "La Okcidenta Ĉambro", "Sinjoro Dongguo" kaj "Sun Ukong Trifoje Batis Skeletospiriton"; kaj porinfanajn librojn, kiel "Simioj Provas Elakvigi la Lunon", "La Fiera Generalo" kaj "Ora Hakilo"; kaj poŝtkartojn, kiel "Pitoreskaĵoj de Pekino", "Orfiŝoj" kaj "Ĉinaj Metiartaĵoj". Ili prezentas la fizionomion de Ĉinio al alilandanoj. La ĉinaj aferoj, inkl. antikvan civilizacion kaj pejzaĝojn, interesis ilin. Iuj libroj kelkfoje reeldoniĝis. Iuj alilandaj legantoj eĉ tradukis ilin en sian gepatran lingvon kaj publikigis ilin. La afero estis ne nur senprecedenca en la ĉina Esperantomovado, sed ankaŭ okulfrapa en la monda movado.

Por bone kaj multe eldoni Esperantajn librojn, necesis fondi Esperantan sektion tiuflankan. En 1966 mi, forlasinte la redakcion de "El Popola Ĉinio", kun kelkaj diplomitaj studentoj starigis Esperantan tradukan sektion en la Fremdlingva Eldonejo. La sekcio estis la unua konstanta stablo por eldonado de Esperantaj libroj en Ĉinio. Tiam Venlo Fon, fama ĉina esperantisto, kiu venis el la redakcio de "El Popola Ĉinio" respondecis pri polurado.

Poste por pli bone eldoni Esperantajn librojn la sekcio aliĝis

al la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj fariĝis ĝia branĉo. En 1981 sub la sankcio de la Ĉina Eldona Buroo, fondiĝis la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ekde tiam publikigo de Esperantaj libroj povas esti regula kaj sistema.

La internacia Esperanta rondo havas bonan tradicion: ĉiuj landoj ĉu grandaj ĉu malgrandaj esperantigas kaj publikigas siajn plej bonajn verkojn kaj interŝanĝas ilin. Ankaŭ Ĉinio tion faras, precipe post la fondiĝo de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, ni dediĉis nin al tiu tasko kaj eldonis multe da libroj kaj albumoj pri ĉina literaturo, fundamentaj scioj kaj scienco, kiel literaturaj verkoj "Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero" de Lusin, "Aŭtuno en la Printempo" kaj "Frosta Nokto" de Bakin, "Qu Yuan" kaj "Bronza Tigro" de Guo Moruo, "Kamelo Ŝjangzi" de Lao Ŝe, "Sunleviĝo" kaj "Fulmotondro" de Cao Yu, "Montara Vilaĝo" de Chun-Chan Yeh kaj "Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang" de Li Ji. Krome ni eldonis ankaŭ "Ĉina Antologio (1919-1949)" kaj "Ĉina Antologio (1949-1979)", en kiuj kolektiĝis ĉefverkoj de modernaj ĉinaj verkistoj. Por sistemigi la eldonadon, ni eldonis ankaŭ serion da libretoj pri ĉinaj popolarakontoj, kiel "Rakontoj pri Afanti", "Saĝosako" kaj "Bovisto kaj Teksistino", kaj serion da mikronoveloj, kiel "Bukedo al



Vi", "Oranĝa Ombrello" kaj "Speciala Premio". En la literatura trezorejo de Ĉinio troviĝas multe da klasikaĵoj kaj akademijaj verkoj, sed ilia traduko estas ne facila. La tradukisto devas esti altnivela kaj dediĉi multajn jarojn al tio. Akademianoj Xie Yuming kaj Laŭlum plenumis tradukadon de famaj ĉinaj literaturaj verkoj "Ruĝdoma Songo" (1) (2) (3) kaj "Mirrakontoj de Liaozhai" respektive, dume eldoniĝis "Analektoj de Konfuceo" tradukita de s-ro Wang Chongfang. Ili sukcesis estis laŭdata de ĉinaj kaj alilandaj eldonistoj de Esperantaj libroj. Krome eldoniĝis ankaŭ "Ĉinaj Mitoj", "Noveloj el Antikva Ĉinio", "Poemoj de Armand Su" k.t.p. Por konigi Ĉinion, ni eldonis "Skizo pri Ĉinio", "40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio", "5 000 Jaroj de Ĉinio", "Moderna Historio de Ĉinio laŭ Temoj", "Antikvaj Filozofoj de Ĉinio", "Antikvaj Ĉinaj Sciencistoj", "Rakontoj pri la Historio de la Ĉinaj Medicino kaj Farmakologio", "Ĉina Ceramiko", "Tajĝiĉjŭan", "Ĉinaj Tradiciaj Festoj", "Moroj de Ĉinaj Nacimalkulturo", "Gvidlibro pri Pekino", "Ĉinaj Familiaj Pladoj", "Enciklopedieto de Ĉinio" k.t.p. Rilate famulojn kaj sciencojn, ni eldonis "Profilo de Zhou Enlai", "Aŭtobiografio de Bakterio", "Brilas Saĝo", "Pri Nia Universo", "Ĉinaj Protektataj Bestoj", "Atlaso de Insekta Morfologio", "Anatomia Nomenklaturaro", "Internacia Vortaro de Mikroba Genetiko", "Ĉina-Esperanta-Angla-Franca

Ĉinmedicina Terminaro", "Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius" k.t.p. Dume ni eldonis ankaŭ albumojn "Vojaĝo tra Ĉinio", "Tibeto sur la Monda Tegmento", "Raraj Floroj kaj Unikaj Arboj" kaj "Pekinaj Vidindaĵoj" kaj porinfanajn bildlibrojn, kiel "Ĉinaj Klasikaj Poemoj Ilustritaj". Ĝis la fino de 1998 la redakcio de "El Popola Ĉinio", la Ĉina Esperanto-Ligo, la Fremdlingva Eldonejo kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis 427 Esperantajn librojn kun 16.27 milionoj da vortoj.

La Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis librojn ankaŭ kunlabore kun alilandaj eldonejoj, kiel "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto", "Esperanta Antologio" kaj "Internacia Komerc-Ekonomika Vortaro en 11 Lingvoj". Memore al la 70-a datreveno de la naskiĝo de Verda Majo, ni kune kun s-ro Miyamoto Masao, fama japana Esperanta verkisto, eldonis "Verkoj de Verda Majo".

En la lastaj jaroj oni volis koni la eksteran mondon kaj kun granda intereso eklernis fremdajn lingvojn, inkl. Esperanton. En nur kelkaj jaroj troviĝis 0.4 miliono

da homoj, kiuj volis lerni Esperanton. Necesas lernolibroj kaj legaĵoj. Nia eldonejo eldonis "Elementa Kurso de Esperanto" de Venlo Fon, "Esperanto-kurso por Memlernado" de Laŭlum, "Paŝoj al Plena Posedo" de William Auld, "Proverbaro Esperanta" kaj "Paroladoj de L. L. Zamenhof", "Vortaro de Esperanto" de Kabe, "Esperanto-Ĉina Vortaro" kun Honfan kiel ĉefredaktoro, "Ĉina-Esperanta Vortaro", "Esperanto-movado en Ĉinio", "Bakin kaj Esperanto", "Verkoj de Ĵelezo" kaj "Hujucz kaj Esperanto".

En 1999 "La Familio", romano verkita de Bakin, fama ĉina literaturisto kaj esperantisto, estis tradukita de Wei Yida kaj eldoniĝis. Ni dankas la verkinton kaj tradukinton, ke ili rezignis la honorarion pro nia financa malfacilo. Ni plenumis la deziron de Bakin pri apero de Esperanta versio de "La Familio". ■

\* La aŭtoro estis aganta ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj respondeculo pri eldonado de Esperantaj libroj ĉe EPC.



# Ĉinaj juro, juĝistoj kaj advokatoj

Mi volus scii ion pri juro, juĝistoj kaj advokatoj en via lando.

Sonja Zednikova (Ĉeĥio)

de JI PING

**A**NTIKVAJ ĉinaj bambuslipoj de Qin-regno konigas, ke jam en la 4-a jc. a.K. Qin-regno en okcidenta Ĉinio praktikis leĝojn en multaj aferoj.

En la komenco de la 7-a jc. fondiĝis Tang-dinastio. Tiam la politiko, ekonomio kaj kulturo multe prosperis kaj ankaŭ la juro atingis sian maturiĝon, kio metis bazon por la feŭda leĝa sistemo en la sekvantaj dinastioj. La vaste konata ĉina leĝa sistemo ja formiĝis en tiu dinastio. Tamen en la longdaŭra feŭda socio de Ĉinio regis aŭtoritatoj, sed ne juro, dum praktiko de ĉia leĝa sistemo dependis de la persona kvalito de la feŭdaj suverenoj.

En 1949, kiam naskiĝis la nova Ĉinio, la ŝtato alfrontis urĝan taskon de granda ekonomia konstruado. La ĉina registaro abolis ĉiujn malnovajn leĝojn, dekretojn kaj justicon unuflanke kaj komencis la socialisman leĝan konstruadon aliflanke. En Ĉinio la tutlanda popola kongreso estas la superaj aŭtoritatoj de la ŝtato. Ĝi praktikas leĝdonajn rajtojn. Ekde la 50-aj jaroj Ĉinio decidis kaj publikigis serion da gravaj leĝoj, kiaj "Geedziĝa Leĝo", "Leĝo pri Agrara Reformo", "Leĝo pri Laboristaj Sindikatoj", "Provizora Regularo pri la Ŝtataj Sekretoj", "Regularo kontraŭ Koruptiĝo", "Provizora Regularo pri Privataj Entreprenoj", "Regularo pri Laborasekuro", "Regularo kontraŭ Kontraŭevolucio", "Praktika

Programo pri Aŭtonomeco de la Nacimallimultaj Regionoj", kaj administraj regularoj pri regpotenca konstruado, socia sekureco, financo, produktado, kulturo, edukado, sciencoj kaj higieno. Tiuj leĝoj kaj regularoj ludis gravan rolon por firmigi la novan regpotencon, defendi la revolucionan ordon, garanti la popol-demokration kaj akceli la nacian ekonomion.

En 1954 Ĉinio faris sian unuan socialisman konstitucion — "Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko", kiu estas ĝia baza leĝo. Ĝi estis plurfoje modifita, ke ĝi fariĝis pli kaj pli kompleta.

En 1966-1976 en Ĉinio eksplodis kultura revolucio, kio multe damaĝis ne nur la ekonomian konstruadon de la lando, sed ankaŭ ĝian leĝan konstruadon. En 1978 la leĝa konstruado suriris la normalan vojon. Kun energia disvolviĝo de sia nacia ekonomio, Ĉinio plirapidigis siajn paŝojn pri konstruo de socialismaj demokratio kaj leĝoj. Ĝis aŭgusto 1999 Ĉinio publikigis sume 253 leĝojn kaj 106 decidojn pri koncernaj leĝoj. Samtempe kun tio la Ŝtata Konsilantaro ellaboris pli ol 800 administrajn regularojn kaj la lokaj leĝdonaj popolaj kongresoj faris pli ol 6 000 lokajn regularojn.

Ekde la jaro, kiam Ĉinio ekpraktikis reformadon kaj pordmalfermon, la leĝdona laboro de Ĉinio atingis grandajn sukcesojn kaj nun ni povas diri, ke ni havas leĝojn en ĉiuj aferoj. La ŝtata konstitucio kaj koncernaj

leĝoj diras, ke nun Ĉinio jam havas kompletan justican sistemon el juĝado, prokurorado, rekognoskado kaj praktikado, kiuj sin reciproke kompletigas kaj detenas en laboro.

La popola prokurorejo estas leĝkontrola organo de la ŝtato. Ĝi estas destinita por kontroli kaj sankcii areston. La popolaj prokurorejoj akceptas rekognoskadon kaj akuzon en la nomo de la ŝtato. La popola juĝejo estas juĝa organo de la ŝtato. Troviĝas ŝtata kortumo kaj altaj, mezaj kaj bazaj popolaj juĝejoj de diversaj niveloj. Neniu organo, institucio aŭ individuo havas juĝrajton krom tiuj difinitaj en la leĝoj.

Laŭ difino de "Juĝista Leĝo de la Ĉina Popola Respubliko" la ĉinaj juĝistoj havas 12 rangojn. La estro de la kortumo estas la plej supera juĝisto kaj sub li estas supera juĝisto, aŭditorio kaj ordinara juĝisto.

La leĝan servadon plenumas advokatoj, notarioj kaj bazaj juĝoficistoj. "Leĝo pri Advokatoj" publikigita en 1996 difinis, ke la advokatoj ne estas ŝtataj juĝoficistoj, sed personoj, kiuj, ricevinte profesion ateston laŭ la leĝo, faras advokatan servon al la socio. Ĉiuj povas sin turni al advokato pro juĝafero. La advokatejo akceptas komision kaj faras kontrakton kun la komisiantoj. Kiam advokatoj funkcias kiel leĝa konsilisto, ili devas prezenti sian opinion pri la koncernaj leĝaj problemoj, verki kaj kontroli la leĝajn dokumentojn, komisiite fari akuzadon, repacigon kaj arbitracion kaj fari aliajn leĝajn aferojn en defendo de la leĝaj interesoj de la petantoj.

Ĝis la fino de 1999 Ĉinio havis 8 400 advokatejojn kaj pli ol 100 000 advokatojn. Pli ol 10 ĉinaj advokatejoj havas agentejojn eksterlande kaj, sankciite de la ĉina justico, 100 alilandaj advokataj agentejoj funkcias en Ĉinio. ■

庆祝《中国报道》创刊50周年  
50-JARA JUBILEO DE «EL POPOLA ĈINIO»



S-ino Zhang Meizhi kaj  
s-ro Yu Tao



Chen Yuan, Chai Zemin, Zhao Changqian, Wan Guoquan  
kaj Wang Xifu (de maldekstre)

# Festo de EPĈ

de LIU SIGONO kaj ZHAO XI




Ragnar Baldursson kaj ĉinaj e-istinoj



Alilandaj EPĈ-gastoj antaŭ la domo de FEB



En la Imperiestra Palaco en Pekino





Sur la placo Tian'anmen en Pekino



"Aŭskultu rakonton pri antikveco."



En kamparo de Zhejiang

Foto de WANG RUIXIANG

# ● ORA JUBILEO DE EPĈ



En la kunsido de la 50-jara jubileo de EPĈ

En ekspozicio "EPĈ hieraŭ kaj hodiaŭ"



Alilandaj EPĈ-legantoj en la kunsido





Sabira Ståhlberg (dekstre) kaj Zhao Changqian



Chen Yuan (dekstre) kaj Zhang Qicheng



Gianfranco Polerani (dekstre) kaj Huang Youyi,  
vicdirektoro de FEB



Laulum, Zhang Meizhi kaj alilanda gasto  
(de dekstre)

La E-sekcio de la Ĉina Radio Internacia donacas al la redakcio de EPĈ tabulon kun vortoj "Bona mentoro".





# Postvivantino

de XIONG XIAOJUN

**E**N Bohai-golfo la pasaĝera ŝipo Dashun estis tiel tragedia kiel Titanic. El la 302 pasaĝeroj nur 21 viroj kaj unu virino postvivis la katastrofon.

Ŝi, 26-jara, nomiĝas Dong Ying. Ŝi ekskursis sen akompananto. Kiam la sireno sonis, ŝi timegis, ĉar la unuan fojon ŝi ŝipveturis kaj vidis senliman maron kun ondegoj altaj je 5-6 metroj. Ŝi ne sciis, kiel vesti sin per savjako, kaj ŝia bela vizaĝo estis malsekigita de larmoj. Tiam du pliaĝaj viroj, kiuj ne portis sur si savjakon, helpis ŝin vesti la savjakon.

Vidante la kaoson en la trairejo, Dong Ying supozis la plej malbonan rezulton. Ŝi konfuzite kuris al konsternita homamaso, kie la viroj cedis la vojon al la virinoj, infanoj kaj maljunuloj, por ke ili povu la unuaj suriri la ferdekon.

Post kelkaj horoj Dashun

malsupreniĝis en la maro kaj la kajuto estis tuj inundita de akvo. En la kajuto kelkaj viroj disrompis la fenestron per diversaj iloj kaj eĉ per kapo kaj pugno. Dong Ying la unua eliris el la kajuto kaj la viroj refoje donis vivesperon al ŝi. Sed ŝi nur balanciĝis sur la maro. Subite ŝi vidis kajakon, sur kiu estis maljunulo, kiu etendis siajn manojn al ŝi. Ŝi klopodadis eniri en la kajakon, sed ne sukcesis. Tiam ondego pelis viron al ŝi kaj la kajako. Li senhezite kaj plenforte ŝovis ŝin en la kajakon. Kiam ŝi etendis siajn manojn al li, ondego forrulis lin, malgraŭ ke la distanco inter ili estis tute mallonga.

La kajako balanciĝis danĝere sur la maro. Dong Ying ploregis. La maljunulo konsolis ŝin: "Kio ajn okazos, mi senrezerve helpos vin, ĉar vi estas juna kaj mi jam maljuniĝis."

Dong Ying ĉesis plori. Ili vidis lumon sur la maro. Sed ondego renversis la kajakon, Dong

Ying firme kaptis la ŝnuron de la kajako, kaj la maljunulo, kiu donis al ŝi forton, tuj malaperis.

Dong Ying ne scipovis naĝi. Antaŭ ol ŝipveturi, ŝi nur rigardis televidan programon pri sinsavo kontraŭ drono. Ŝi ŝtopis sian nazon per du fingroj kaj forte spiris per la buŝo, por ke akvo ne iru en ŝian nazon. Post longa tempo ŝi proksimiĝis al la bordo, kune kun la kajako. Iu tiris ŝin, sed malsukcesis. Ŝi flosis foren. Por eviti eventualan danĝeron, ŝi rapide malligis la kajakŝnuron, tiam ondego pelis ŝin al la bordo. Iu fiŝkaptisto volvis ŝin per plumremburita vesto kaj ŝi postvivis.

Kiel feliĉa ŝi estas! Kun malkvieto ŝi diris, ke se tiuj viroj ne ĝustatempe helpus ŝin, ŝi estus forglutita de la maro.

En tiuj tagoj sur la maro flosis lilioj, el kiuj unu montris funebbron de Dong Ying. Ŝi sopiras tiujn mortintajn virojn grandajn kaj senegoismajn. Ŝi volas rakonti la okazaĵon al ĉiuj foje kaj refoje. ■



# Interesa festivalo de "Ruĝa Vesto"

La foiro de Sishui ekviglis jam antaŭ pli ol 700 jaroj. Tiam pro trafika maloportuno, estis malfacile por la lokanoj precipe virinoj malsupreniri la monton, do ili vizitis la foiron okazantan en printempo, kaj krome ili sin vestis per plej bela vesto.

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

**L**A 15-an de la tria monato laŭ la ĉina luna kalendaro okazas foiro de jaŭ-oj de Sishui de Longsheng-urbeto, nordoriente de Guangxi. Tiun tagon en la urbeto ĉie brilas ruĝaj vestoj portataj de jaŭ-aj virinoj, ĉar ili festas la belan festivalon — "Ruĝa Vesto".

Lokanoj diris, ke la foiro de Sishui ekviglis jam antaŭ pli ol 700 jaroj. Tiam pro trafika maloportuno, estis malfacile por la lokanoj precipe virinoj malsupreniri la monton, do ili vizitis la foiron okazantan en printempo, kaj krome ili sin vestis per plej bela vesto. Tie ili interŝanĝis lokajn produktaĵojn kontraŭ tolo, salo kaj terkulturiloj. Poste ili laŭvole kantis, kaj la foiro iom post iom fariĝis kantokunveno.

Nun en la foiro ĉiuj varoj estas aĉeteblaj: pampelmusoj, tritiksemoj, plantidoj de rizo kaj kapsiko, kokidoj kaj anasidoj... Iu maljunulino en ruĝa vesto forvendis kelkajn fiŝkorbojn kaj aĉetis 10 parojn da kokidoj. Ŝi diris, ke ŝi loĝas dek kilometrojn fore apud la rivero. La jaŭ-aj domoj el ligno ĝenerale situas sur montodeklivoj. Duono de la domo estas subtenata de lignaj fostoj, oni nomas tian domon "pendanta domo". La

maljunulino diris, ke ŝi ŝatas sidante antaŭ sia domo plekti bambuaĵojn, kiuj estas uzataj por teni legomojn, por lavi rizon, por teni kokojn kaj por kapti fiŝojn... La jaŭ-oj ne disigeblas de bambuo.

Ŝi sin puŝis en homamason, ĉar ŝi volis partopreni la sciencan kurson pri "sen rizo bredi kokojn". La preleganto estis studento. Li diris, ke por bredi 10 kokojn, oni devas prepari duonkilogramon da sojfabo kontraŭ 1.8 juanoj, faru ĝin sojfabo lakto, miksu en ĝin 5 kilogramojn da fekaĵo de bovo, 2.5 kilogramojn da porkosango, 5 kilogramojn da pulvoro de pina pinglo kaj 12.5 kilogramojn da akvo. Hermetikigu ilin en vazego por 10 tagoj. Tiam vi havos proteinatoriĉan brutnutraĵon — sojfab-pinglajn vermojn. Prenu duonon kiel koknutraĵon kaj la ceteran por daŭra produktado. En la sekvanta tago unu vermo naskas 2-3 idojn... Post tio li disdonis la koncernajn materialojn, dirante:

"Oro estas valora, tamen sciencoj estas pliaj. Mi donu al vi libron senpage." Aŭskultantoj tuj aplaudis. Ankaŭ la ruĝvesta maljunulino prenis unu ekzempleron. Ŝi diris, ke ŝi estas analfabetino, kaj la libron ŝi donos al siaj gefiloj por ke ili ĝin legu.

Aplaudoj kaj ridoj aŭdiĝis de herbejo norde de la ponto. Tie knabinoj en ruĝaj vestoj faris konkurson pri har-longeco. Iu el ili havas la harojn 1.64 m longajn, je 10 cm pli longaj ol ŝia alteco. Pri la sekreto de la harprotekto, ŝi diris, ke en la monta vilaĝo ne troviĝas speciala ŝampoo, oni lavas la harojn per akvo post rizlavado kaj fontakvo. Tion dirante ŝi volvis la harojn per poŝtuko. La nigra poŝtuko, ruĝa vesto kaj multe plisita jupo plibeligis la longharulinojn.

"Bambustanga konkuro" de jaŭ-oj estas farata speciale por la festivalo. Du junuloj kun bambustango sur abdomeno inter ili, kaj per tiu ili forte puŝas unu la alian. Kiu estas puŝita el la konkursa tereno, tiu estas venkita. Ĝenerale la venkanto gajnos amon.

"Daqigong" estas ludo partoprenata ekskluzive de gejunuloj. En ludo la ruĝvestitaj knabinoj ĵetas argilajn bulojn al junuloj en flava vesto por trafi la blankan parton de lia brusto aŭ dorso. Laŭdire la ludo originis de la ĉasa vivo de jaŭ-aj prapatroj en la primitiva socio.



Foirejo en la urbeto

Tiam ili ofte ĉasis fiŝojn kaj bestojn per kotbulo kaj ŝtona sagpinto. Poste tio transformiĝis en la ludon. Kiam junuloj laciĝis de laboro en kampo, ili do ludas "Daqigong" por ellaciĝo. En la ludo oni ankaŭ esprimas sian amon al la amato.

Por gejunuloj la festivalo "Ruĝa Vesto" estas ankaŭ festo de geamantoj. Ili venas el la montaro, konatiĝas en foiro de Sishui, kaj alterne kantas, akompanas unu la alian al rivereto, bambuaro aŭ floraro, kiam ili kontentas unu je la alia, do decidas sekvantan rendezuon...

"Kian amaton vi preferas?" Mi demandis kelkajn fraŭlinojn belajn en kantado kaj vizaĝo. "Saĝan kaj belan," iu diris. "Al riĉa kaj bela mi preferas bonkoran," alia respondis. "Mi volas la amaton sam-temperamentan kiel mi," la tria intermetis.

Ĝenerale havis saman romantikan sperton la junaj kaj belaj patrinoj kun bebo dormanta en brodita surdorsa sako. ■



### En bambustanga konkurso



### Jaŭ-aj virinoj en festaj vestoj






"Rigardu, kiu havas harojn plej longajn."



Floroj por la gajninto en konkurso pri har-longeco



Alilandan turiston interesas arĝenta orelingo de jaŭ-ino.





# Historiaj signoj (I)

Ĉe la 4-a posttagmeze de la 2-a de decembro 1929, jam lo suno subiris, estis malvarme. Sub malhela kandellumo, subite iu laŭt eksis: "Kio? Kranio!" Tio estas la unua kranio de "Pekin-homo" sensacianta la mondon.

de PING HUA

**E**N la komenco de la 20-a jc. naskiĝis la moderna ĉina arkeologio, kies gravaj eltrovoj ne nur reskribis la historion de la ĉina nacio kaj eĉ tiun de la homaro, sed ankaŭ helpis serĉi signojn de prauloj. Ni konigas en du numeroj iujn gravajn arkeologiajn eltrovojn multe influantajn en la 20-a jc.

## LA RUINO DE SHANG-DINASTIO: ĈEFURBO ANTAŬ 3 000 JAROJ

La skribaĵoj sur testudaj ŝeloj malkovritaj en 1899 inspiris arkeologojn al prifosado de la ruino de Shang-dinastio, kies eltrovo markis la naskon de la moderna ĉina arkeologio.

Iun tagon de 1899, s-ro Wang Yirong, fakulo pri studo de

skribaĵoj sur antikvaj bronzaĵoj kaj ŝtonaj objektoj, aĉetis en a poteko de Pekino kontraŭmalariajn drogojn, inter kiuj estis pecoj de testuda ŝelo, kaj li surprize rimarkis, ke sur ili legiĝas nekonataj antikvaj vortoj. Jen la plej antikva skriba lingvo de Ĉinio eltrovita. Post kiam la informo cirkulis, testudaj ŝeloj iĝis valora antikvaĵo. Por profitego komercistoj ĉiam gardis kiel sekreton la lokon — Xiaotun en Anyang, Henan-provinco, kie oni elterigis tiujn testudajn ŝelojn. Nur en 1908 arkeologoj konstatis, ke Xiaotun estas la ruino de la ĉefurbo de Shang-dinastio, kiu silentis jam pli ol 3 000 jarojn.

De 1928 ĝis la printempo de 1937 ĉinaj arkeologoj 15-foje faris sciencan prifosadon de la ruino, kies amplekso kaj sukceso estis grandaj kaj metis bazon por la moderna ĉina arkeologio. En 1939, du jarojn post eksplodo

de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la prifosado devigite ĉesis. En 1950 arkeologoj de la nova Ĉinio rekomencis la prifosadon. Post entute pli-ol-70-jara prifosado la ruino de Shang-dinastio kun areo de pli ol 30 kvadrataj kilometroj finfine aperis antaŭ ni. En la ruino, krom skribo sur testudaj ŝeloj, estas ankaŭ multaj aliaj valoraj objektoj: tomboj kaj kavoj por kultado kaj por ĉevaloj kaj ĉaroj. En ĝia centro imponas la ruinoj de imperiestra palaco kaj temploj, kie imperiestroj kaj princoj kultis siajn prapatrojn. Tiuj ruinoj kaj historiaj objektoj montras unuflanke la socian vivon antaŭ 3 000 jaroj kaj aliflanke la tiamajn civilizacion kaj teknologion. La granda *ding-o* (kvarpieda ujo) Simuwu estis elterigita en la ruino de Shang-dinastio en 1939. Ĉar oni ne povis transporti ĝin kaj timis, ke ĝi estos alproprigita de japanaj

agresantoj, oni denove enterigis ĝin. En 1946 oni reelterigis ĝin. Nun ĝi estas montrata en la Ĉina Historia Muzeo kiel trezoro.

## DUNHUANG: ARTA TREZOREJO EKSTERORDINARA

Mogao-kavernaro en Dunhuang iĝis arta sanktejo de religio pro tio, ke tie konserviĝas mirinde multnombraj statuoj kaj freskoj faritaj dum la periodo de la Nordaj Dinastioj (386-581) ĝis Yuan-dinastio (1206-1368). Laŭdire, se oni interligas la freskojn en Mogao-kavernaro, ilia longeco superas 30 km. En 1900 oni hazarde malkovris sekretan kavernon kun sennombraj antikvaj sutroj, broditaj bildoj, skribaĵoj, religiaj instrumentoj kaj aliaj valoraĵoj. Tio faris grandan sensacion. Jen naskiĝis nova fako en la mondo, t.e. Dunhuangologio.


Wang Yuanlu, kiu fuĝis de Hubei al Gansu pro natura katastrofo, fariĝis intendanto de




La *ding-o* Simuwu



Skribo sur  
testudaj  
ŝeloj



Imperesta kiroo malkovra en Dingling



Fresko en la kavo 285 de Mogao-kavernaro




Imperiestr-edzina krono malkovrita en Dingling



Palaca servistino kun lanterno

Jada vesto




Mogao-kavernaro. Matene de la 26-a de majo 1900, kiam li forigis sablon de iu kaverno, subite muro skuiĝis kaj fendiĝis: ŝajne kaŝiĝis

interne sekreta kaverno. Li miris kaj tuj fosis la kaverton. Ho! ĝi estis plena de historiaj objektoj. Tio estas kaverno de sutroj.



Statuo de Pekin-homo

Krania fosilio de Pekin-homo



Tamen la stulta Wang ne sciis, ke ĉiuj tiuj estas la plej brilaj kulturaĵoj de la antikva Ĉinio, kaj la putra registaro de Qing-dinastio ne kapablis zorgi pri la eltrovo en malproksima dezerto, do aventuristoj el Rusio, Hungario, Francio, Japanio kaj aliaj landoj, kiuj venis laŭ informoj, aĉetis de Wang nekalkuleblajn valorajn sutrojn, pentraĵojn kaj statuojn per tre malmulte da mono. Unuvorte, ili posedis ĉion, kion ili povis transporti, kaj restis nur netransporteblaj freskoj kaj skulptaĵoj. Hodiaŭ, kiam fakuloj de la Dunhuang-a Instituto konsultas dokumentojn pri Dunhuang, ili devas aĉeti de alilandaj muzeoj koncernajn mikrofilmojn.

## PEKIN-HOMO: PRAPATRO ANTAŬ 500 MIL JAROJ

En la 2-a de decembro 1929 la unua kompleta kranio de Pekin-homo malkovriĝis en Zhoukoudian, sudokcidenta Pekino. Dank' al tio, oni datis la homan originon antaŭ 500 mil jaroj.

En sudokcidenta Pekino staras malgranda kalkŝtona monto. Ŝtonhakistoj ofte trovis fosiliojn en sablo de grotoj kaj montfendoj. La lokanoj vendis tiujn fosiliajn pecojn al apoteko. En 1926 alilandaj fakuloj atestis, ke inter la fosilioj elterigitaj en 1923 estas dento de praulo antaŭ 500 mil jaroj, t.e. Pekin-homo. En 1927 la Ĉina Instituto de Enketo pri Restadejoj kaj la hospitalo "Harmonio" de Pekino subskribis en la nomo de Ĉinio kaj alia lando interkonsenton pri sistema prifosado en Zhoukoudian. Monhelpis la Fonduso Rockefeller.

Ĉ. la 4-a posttagmeze de la 2-a de decembro 1929, kiam la suno subiris, estis malvarme. Sub malhela kandellumo, subite iu laŭte kriis: "Kio? Kranio!" Tio





La maŭzoleo Dingling

estas la unua kranio de Pekin-homo sensacianta en la mondo.

La prifosado en Zhoukoudian daŭris ĝis la 70-aj jaroj de la 20-a jc. Oni eltrovis ses kompletajn kaj preskaŭ kompletajn kraniojn kaj grandan kvanton da fosilioj de homaj ostoj, inkl. de pli ol 40 skeletoj. Krome, multaj simplaj laboraj instrumentoj kaj postsignoj de fajro-uzado estas valoraj por studo pri la prauloj antaŭ 500 mil jaroj. Ege bedaŭrindas, ke ĉiuj fosilioj eltrovitaj dum la 20-30-aj jaroj perdiĝis dum la Pacifika Milito en 1941.

## DINGLING: GRANDIOZA SUBTERA PALACO

Sude de Jundu-monto en Changping-gubernio de Pekino imponas la Dek Tri Maŭzoleoj de 13 imperiestroj de Ming-dinastio (1368-1644) kun totala areo de pli ol 40 kvadrataj kilometroj. Ĉirkaŭitaj de montoj kun pitoreska pejzaĝo, la

maŭzoleoj malsamas je amplekso kaj lukseco, tamen ĝenerale similas iliaj arkitekturaj aranĝoj kaj stiloj. El ili plej famas la maŭzoleoj Changling kaj Dingling. Maje de 1956, post sankcio de la centra registaro, ekis la prifosado de la maŭzoleo Dingling. La grandioza kaj mistera subtera palaco estis malfermita.

En Dingling oni malkovris grandan kvanton da raraj trezoroj. Krom la kadavroj de imperiestro Wanli kaj liaj du edzinoj, troviĝis ankaŭ liaj robo kaj kronoj de liaj edzinoj. Sed dum la kultura revolucio granda kvanto da historiaj objektoj, inkl. de la tri kadavroj, estis forbruligitaj. Krome, pro manko de taŭga metodo konservi historiajn objektojn kaj mislaboro, iuj trezoroj estis difektitaj. Ege maltrankvilaj pri tio, iuj fakuloj skribis al la Ŝtata Konsilantaro pri protekto de la historiaj objektoj. Poste, laŭ la ordono de ĉefministro Zhou Enlai, oni

ĉesigis la prifosadon de la maŭzoleo Dingling.

## MANCHENG: JADAJ VESTOJ KAJ PALACAJ LANTERNOJ

En Mancheng-gubernio je 20 km nordokcidente de Baoding staras monteto, kiun oni nomas deantikve Monarka Maŭzoleo. La lokanoj pretendas, ke ili estas posteuloj de gardistoj de la tombejo, sed neniu scias pli detale. En 1968 tiu antikva enigmo estis solvita en ŝtonhakado.

La prifosado de la maŭzoleoj de Han-dinastio en Mancheng konis plurajn altajn tajdojn. La grandeco de la subteraj palacoj kaj multeco de la historiaj objektoj estis ekster la atendo de la arkeologoj. La konstato montras, ke en la maŭzoleo ripozas Liu Sheng, la unua princo de la princlando Zhongshan de la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. — 24 p. K.). Li regis 42 jarojn kaj mortis en la jaro 113 a. K. Post prifosado de la maŭzoleo de Liu Sheng, historiisto Guo Moruo asertis laŭ la sepulta moro de la Okcidenta Han-dinastio, ke norde de lia maŭzoleo estas tiu de lia edzino. Poste, ĝuste en tiu loko oni trovis la maŭzoleon de lia edzino.

La du maŭzoleoj estis gigantaj kaj bone konservitaj kun klaraj datoj kaj multaj historiaj objektoj. Tio estas granda afero en la historio de la ĉina arkeologio. Estas plej ĝojiga, ke inter la entombigitaĵoj estis kelkaj raraj trezoroj: du bone konservitaj, sed unuafoje malkovritaj vestoj faritaj el pli ol 4 600 jadaj pecoj interligitaj per oraj fadenoj en totala pezo de 1 800 g., kaj famaj elegantaj palacaj lanternoj, kiujn palacaj servistinoj gracie tenas ambaŭmane. Krome, estas luksa kaj eleganta incensujo. Ĉio tio pravas, ke en la Okcidenta Han-dinastio la metiarto jam atingis altan nivelon. ■



Alplandaĵoj

# Brodaĵoj de Shaanxi

Fotoj de LI CHUNGENG

Ornamaĵoj



En brodado



Brodaĵoj de Shaanxi, parto de la popola arto, montras per siaj simpleco kaj modesteco la vivon en la kamparo de Shaanxi-provinco. Kamparanoj heredas kaj popularigas la brodadon inter si.

En la kamparo brodaĵoj servas ankaŭ kiel doto por la novedzinoj. Oni lerte brodas buntajn desegnojn sur antaŭtuko, manumo, kapkuseno, alplandaĵo, mansaketo k.a.

"Malgrandaj tigroj"



● Estas aktive efektivigata la "inĝenierio de la ĉefurbaj verdaj apartigaj zonoj" kiu celas plibonigi la ekologian medion de Pekino. Dank' al tiu inĝenierio Pekino havos post 3 jaroj urbajn arbarojn sur areo de 100 kvadrataj kilometroj kaj 100 parkojn. Ili fariĝos verda ĉeno ĉirkaŭ Pekino.

● Nun en Ĉinio la nombro de abonantoj de poŝtelefono jam superis 50 milionojn, nur malpli ol tiu de Usono kun 86 milionoj.

● Pasaĝera aeroplano "Xin Zhou 60" taŭga por branĉaj linioj estis lanĉita en Pekino. Ĝi estis ekipita per turbina generatoro, la plej moderna kaj plej vaste uzata en la mondo. Ĝia kvalito egalas al tiu de Boeing 737. La stabileco de tia aeroplano en ĝia starto kaj flugado estas neniom malpli bona ol tiu de avangardaj fremdlandaj grandaj pasaĝeraj aeroplanoj, sed la prezo estas nur 2/3 de tiu de la samspecaj de aliaj landoj.

● La Industria Distrikto de Suzhou kunlabore funkciigata de Ĉinio kaj Singapuro estis taksita de brita ekonomika gazeto kiel unu el la dek plej bonaj industriaj distriktoj de Azio.

En la pasintaj 6 jaroj ĝis marto de 2000, la Industria Distrikto de Suzhou sankciis funkciigon de 186 entreprenoj de fremdlanda kapitalo, kaj 36 devenis de la 500 potencaj industriaj entreprenoj de la mondo. La distrikto enkondukis 7 miliardojn da usonaj dolaroj kiel kontraktitan kapitalon, kaj duono de la sumo jam estis utiligata. Nun ankoraŭ multe da fremdlanda kapitalo estas asignata al konstruo de la distrikto.

● Ĉinaj sciencistoj efektivigis atoman "fontanon" pere de la teknologio pri atoma malvarmigado: 80 milionoj da atomoj estis elŝprucigitaj 1-2 cm. alten.

Tio signifas, ke ekzistas ebleco por ĉinoj esplori atoman laseron, ke Ĉinio fundamente posedas la kernan teknikon en esplorado super atoma horloĝo. Ĉar atoma "fontano" povas esti turnita en ege precizan atoman horloĝon, kaj la ekarto en 30 milionoj da jaroj estas nur unu sekundo.

● Ĉinio jam elfaris la unuan aŭtomobilon movatan per hermetika nikela-hidrogena baterio. Post elektroŝargo la aŭtomobilo povas veturi 225 kilometrojn.

● En la Ŝtata Rezervejo Foping en profunda arbaro en Qinling-montaro oni refoje vidis brunan pandon. Ĝi estas la kvara bruna pando trovita en la nomita naturparko.

Specialistoj diris, ke la trovo refoje pruvis, ke pando ne estas besto de monotipa specio. Bruna pando estas originala specio de pando.


Pando estas tre antikva bestospecio spertinta ŝanĝigon en 3 milionoj da jaroj. Pando estas milda kaj aminda, sed malforta en generado kaj sindefendo kontraŭ malamikoj. Nun en la mondo oni nombras nur ĉ. 1 000 pandojn, kaj ili vivas en la montaroj Qinling kaj Bashan de Ĉinio.

● Ĉinio nun havas pianan muzeon en Gulangyu de Xiamen, Fujian-provinco. Gulangyu estas honore nomata "piana insulo", ke tie multaj homoj ludas pianon. En la muzeo oni

eksponas 30 diversajn pianojn. Inter ili estas pianoj faritaj en Usono kaj Aŭstrio en la unua duono de la 19-a jarcento, piano uzata de la imperiestra familio de Germanio, kvarpieda klaviceno plej antikva en la mondo, la plej granda fortepiano, antikva risorta piano... Ĉiuj tiuj pianoj estas tre valoraj postvivintaj la du mondmilitojn en Eŭropo.

● Ĉinio nun havas sian unuan Ŝtatan Vulkanaran Parkon en Tengchong-gubernio, okcidente en Yunnan-provinco. En la nomita gubernio estas 97 vulkanoj en 8 grupoj, kaj la lafo kovras 1 038 kvadratajn kilometrojn. La vulkanaro estas unu el la plej junaj vulkanaroj en la mondo. Ĉie en la areo dense lokiĝas konusoj, karstaj kavernoj, stalagmitaj terasoj, krateraj lagoj, akvofaloj pro ŝtopiĝo k.a. Multaj ĉinaj kaj alilandaj sciencistoj alte taksas la lokon pro ĝia valoro en esplorado pri vulkano, tervarmo, terstrukturo kaj sismo.

En la Ŝtata Vulkanara Parko en Tengchong



# Du poemoj

de Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)

## REMEMORO<sup>1</sup>

La rememorojn viv' protektu.  
Mi, ŝajne, havis tiam dekdu,  
aŭ eĉ malpli, sed mi elektu,  
kaj diru pri l' dektri.  
Mi apartenis al revantoj:  
Inspiris min heroaj kantoj  
kaj la leteroj Esperantaj,  
kiujn ricevis mi.

Inter la korespondamikoj  
troviĝis pastro, du laikoj,  
geavoj ĉarmaj kaj komikaj  
pro la edifinklin'.  
En tiu vigla aĝo mia  
mi, tamen, revis pri alia  
amiko senmelankolia,  
des pli pri amikin'.

Kaj, evidente en aprilo,  
aperis kaŭzo por jubilo,  
ĉar tute fuĝis for trankvilo —  
jen kaŭzo por edif'.  
Nur kelkaj frazoj de knabino,  
samkiel mi, komencantino,  
sufiĉis por ke venu fino  
de la kvietaj viv'!

Samaĝulino el Kantono!  
Vi, certe, estis Dia dono.  
Eĉ panjo venis kun admono  
en tim' pri mia san'.

Dum horoj, kvazaŭ en hipnoto,  
mi gapis al ridanta foto —  
ja, estis tute ne eroto  
ĉi tiu korelan'.

Nenio eksterordinara  
estis en vi, ho dektrijara  
ĉinino mia nigrahara,  
ridanta kun incit', —  
sed min ja altaj sentoj movis,  
do mi superajn trajtojn trovis,  
kaj etajn dubojn tuj forblovis  
via magia rid'.

Ah, kiel revoj miaj flamis!  
Ĉu amis mi? Sendube amis.



La aŭtoro

Jes, miaj rimoj iom lamis,  
sed, al ĉiesa mir'  
la prancemul' ne tro afabla,  
trankvile sidi malkapabla,  
nestiĝis ĉe la skribotablo —  
poemojn verkis mi.

Jen la infana emocio:  
Alternis fajro kaj glacio  
inter aspiro kaj konscio  
pri l' for' de ŝia land' —  
Nun restis nur en miaj bretoj  
kelkaj el ĉarmaj donacetoj,  
sed vokis tiam al poetoj  
min ŝi kaj Esperant'.

## BONVENON, PUŜKIN<sup>2</sup>

En la fora jar' mil okcent dudek  
naŭa,  
el la fora rusa urbo Peterburgo  
al Pekino iris rusa ambasado,  
kaj kun tiu iris Aleksandr Puŝkin.

Ĉu vi scias, kiel ĉinoj lin  
atendis? —  
Tage-nokte vaĉis sur la Granda  
Muro,  
rostis plej bongustajn ovojn kaj  
akridojn,  
kaj elektis junulinojn la plej  
belajn.

Ili freŝas, kvazaŭ maja flor' ĉeriza,  
ili sveltas, kvazaŭ cedro en  
montaro,  
ili amas, kvazaŭ en edenon levas, —  
preterpasi ilin povas nur kadavro.

Venu-venu al ni, Aleksandr Puŝkin,  
manĝu-manĝu la akridan rostitaĵon,

prenu-prenu inter niaj junulinoj  
la edzinon obeeman kaj fidelan!

Venu-venu al ni, Aleksandr  
Puŝkin!  
La akridoj plibonigas digestadon,  
la edzin' fidela nervojn  
trankviligos,  
do, vi verkos ĝis centjara jubileo.

Sed forputris la akridoj nemanĝitaj,  
sed forvelkis niaj belaj junulinoj,  
ĉar ne venis al ni Aleksandr  
Puŝkin —  
ne permesis la damnita rusa caro!

Do, ni skribu nepre tuj en  
protokolon  
de l' altranga hodiaŭa konferenco:  
Kulpas nure Nikolao la Unua  
pri la krizo de papero-produktado!

1. Antaŭ kelkaj jaroj mi fosis mian malnovan leterkeston kaj trovis kelkajn leterojn, kiujn mi knabaĝe ricevis de ĉina knabino. Mi rememoris, ke ŝi estis la unua knabino el inter miaj tiamaj korespondamikoj, kaj ke estis ĝuste ŝiaj leteroj, kiuj provokis aperon de miaj unuaj versprovoj en Esperanto. Konstatinte tion, mi verkis tiun ĉi poemon.

2. En 1829 Aleksandr Puŝkin petis al la caro Nikolao la Unua permeson iri al Ĉinio kun la rusa ambasado. Mi uzis tiun ĉi fakton, farante la ŝercan kantoserion kun elpensita parolado de la ĉina delegito.

# Libroj ricevitaj de EPĈ-redakcio kaj Ĉina Esperanto-Biblioteko

**Kio estas demokratio?** 80 demandoj kaj respondoj. David Beetham kaj Kevin Boyle kun desegnaĵoj de Plantu. Rotterdam: UEA, 2000. 143 p. 21 cm. Libro estas utila al ĉiuj, kiuj deziras scii pli pri la teorio kaj praktiko de demokratio.

**Lingva arto.** Red. Vilmos Benczik. Rotterdam: UEA, 1999. 217 p. 21 cm. Majstroj de la lingva arto, William Auld kaj Marjorie Boulton, havas grandegan meriton en tio, ke Esperanto fariĝis lingvo moderna en ĉiuj sencoj. En la jaro de la 75-a datreveno de siaj Honoraj Membroj UEA gratulas ilin per tiu ĉi jubilea kolekto de eseoj kaj artikoloj.

**Hejma vortaro.** Red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: UEA, 1999. 62 p. 21 cm. Prezo: 7,50 eŭroj. Esperanto-vortoj por hejmaj aĵoj kaj agoj kun traduko en dek tri lingvoj. La materialon kolektis la anoj de la komputilreta diskutejo DENASK-L kaj la kunlaborantoj de Rondo Familia de UEA.

**Lito apud la fenestro.** Rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj de Betty Salt (1907-1994). Rotterdam: UEA, 1999. 111 p. 21 cm. La kanada esperantistino Betty Salt, Honora Membro de UEA, konatiĝis dum sia vivo kiel entuziasma loka aktivulo kaj grandanima mecenato de la Esperanto-movado. Ŝi estis dotita ankaŭ per la talento verki, kion atestas jena kolekto de ŝiaj postlasitaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, kaj de kelkaj tradukoj el la kanada literaturo. Senpretendaj sed belstilaj, ili posedas ĉarmon, kiu facile kaptas la leganton, ankaŭ tiun malpli spertan, dank' al la relative facila lingvaĵo.

**Paĉjo, kio estas**

**rasismo?** Tahar Ben Jelloun (1944). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Jak Le Puil. Rotterdam: UEA, 1999. 52 p. 19 cm. Prezo: 6,50 eŭroj. "Infano estas scivolema. Ĝi faras multajn demandojn kaj ĝi atendas precizajn kaj konvinkajn respondojn. Per ĉi tiu libro mi provas respondi la demandojn de mia filino. Ĝi celas la infanojn kiuj ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj volas kompreni. Pri la plenkreskuloj, kiuj ĝin legos, mi esperas ke ĝi helpos ilin respondi la demandojn, pli embarasajn ol ni kredas, de siaj propraj infanoj." (Tahar Ben Jelloun) Tiu ĉi libro de la Marokdevena aŭtoro enorme furoris en Francio. En 1987 Tahar Ben Jelloun gajnis la prestiĝan Premion Goncourt.

**Kulturo kaj sano.** Mervyn Claxton. Rotterdam: UEA, 1999. 42 p. 21 cm. Prezo: 5,40 eŭroj. Nova libro en la Unesko-serio de UEA pri sano el socia vidpunkto.

La supre menciitajn librojn donacis UEA. Mendu ĉe UEA.

**Historieto de Esperanto.** Ludovikito. Libroteko Tokio, 1998. 467 p. 21 cm. Prezo: 4,600 enoj.

**Taglibro de Anne Frank.** Trad. Nora Bartels. Libroteko Tokio, 1997. 299 p. 21 cm. Prezo: 2,800 enoj.

**Raportoj el Japanio** (Aprilo

1991 - Aŭgusto 1997). Hori Jasuo. Libroteko Tokio, 1997. 205 p. 21 cm. Prezo: 2,200 enoj. Temas pri 94 diversaj aferoj okazintaj en Japanio inter 1991 kaj 1997. Ĝi donos al legantoj novan bildon pri Japanio.

**Raportoj el Japanio** (Septembro 1997 - Decembro 1998). Hori Jasuo. Libroteko Tokio, 1999. 84 p. 21 cm. Prezo: 1,200 enoj.

**Vojaĝo en Vjetnamio.** Hori Yasuo. Horizonte, 1999. 24 p. 26 x 18.5 cm. Prezo: 200 enoj.

La suprajn 4 librojn donacis Syozik Keiko kaj Hori Jasuo. Aĉeteblaj ĉe JEI, KLEG, UEA kaj Libroteko Tokio (7-15, Nishinipori 3, Arakawa-ku, Tokio, 116-0013 Japanio).

**La morto de Ivan Iljiĉ (novelo).** Lev Tolstoj. Trad. Valentin Melnikov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1997. 56 p. 20 cm. Prezo: 6 guldenoj.

**75 jaroj.** Aŭtobiografio, poemoj, bibliografio. William Auld. Red. Aleksander Korĵenkov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 48 p. + 8 p. (fotoj) Prezo: 4 eŭroj. Adr. Ru-620014, Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando. Retpoŝto: hrgo@sbank.e-burg.su

**Mallonga historio de la Esperanto movado en Irlando.** Liam O Cuirc. Esperanto-Asocio de Irlando, 1996. 32 p. 21 cm.

**Elĉerpaĵoj el la irlandlingva literaturo.** Kompilita de Liam O Cuirc. Esperanto-Asocio de Irlando, 1996. 27 p. 21 cm.

**Eŭropa ideologio.** Zlatko Tišljar. Maribor: Inter-kulturo, 1998. 68 p. 16.5 cm.

**Proverbaro — nia komuna heredaĵo.** Red. kaj trad. Erkki Rontynen. Oulun yliopistopaino, 1999. 203 p. 24.5 x 17 cm.

**La kostoj de la eŭropa lingva (ne-)komunikado.** Red. Reinhard Selten. "espERanto" Radikala Asocio. 148 p. 24 x 17 cm.



## PILGRIMADO AL SANKTA LAGO

200 kilometrojn norde de Lhasa, ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, estas lago Namco, unu el la tri famaj sanktaj lagoj sur la Tibeta Altebenaĵo. La aliaj du estas Mapangyong en Ali-subregiono kaj Yarzhoyum Co sudokcidente de Lhasa. Religiaj dokumentoj registris multajn legendojn kaj mitojn, kio altiris al la lagoj pilgrimantojn proksimajn kaj malproksimajn.

Namco-lago areais 1 940 kvadratajn kilometrojn kaj situas en la loko 4 700 metrojn super la marnivelo. Ŝajne ĝi estas la plej alta salakva lago en la mondo. La lago inkrustiĝas en la sino de la montaro Nyanqentanglha. En la lago kuŝas du insuletoj kaj ilin vizitas printempe multaj migraj birdoj por generado. La montetoj kaj duoninsuloj ĉirkaŭ la lago estas kalkŝtonaj. Pro erozio de vento kaj akvo ili formis admirindajn aspektojn.

Laŭ mito Namco-lago estis filino de Bomo-lago (en Shenzha-gubernio de Tibeto). Ŝi enamiĝis al la montaro Nyanqentanglha kaj edziniĝis al li. Ŝi venis al la edzo portante diademon el perloj, agato kaj koralo, kiuj faris ŝin dignoplena kaj ĉarma. Ŝi kantis kaj dancis, kaj ŝiaj kantado kaj dancado fascinis la paŝtistojn de la loko. Sed ĉe la piedo de la montaro estis tro malvarme, kaj vintro venis tre frue, dum la paŝtistoj nomadis tro dise sur la herbejoj, kaj ŝi malofte povis vidi ilin. Iom post iom ŝi ne povis elteni la malvarmon kaj enuecon, kaj perdis la intereson tualeti. Ŝi ĵetis la belan diademon kaj kolĉenon en la lagon. Kaj ĝis nun multaj paŝtistoj kredas, ke sur la fundo de la lago estas multe da perloj, agato kaj koralo.

La mito faris la lagon mistera

kaj alloga. Fruprintempe, piaj budhanoj pilgrimas mil kilometrojn por viziti la lagon. Ili ĉirkaŭiras la lagon, turnante preĝradon en la mano kaj senĉese murmuris sutrojn por peti patronon de la sankta lago. Multaj el ili sin banas en la lago kaj portas hejmen botelon da akvo de la lago. Ili kredas, ke bano en la lago kaj trinko de akvo el la lago forlavos la krimon dum la tuta vivo kaj longigos la vivon kaj eĉ enlasos ilin en la paradizon.

## ĈEVALO — FLUGILOJ DE KAZAĤOJ

En la Ili-a Kazaĥa Aŭtonoma Subregiono de la Xinjiang-a Ŭjgura Aŭtonoma Regiono oni bredas mondfaman Ili-ĉevalojn. La ĉevaloj de tiu raso estas altaj, fortaj kaj okulplaĉaj. Ili estas kurlertaj kaj eltenemaj kontraŭ malsano kaj frosto.

Kazaĥ-nacio estas nomata "nacio sur ĉevalo". Deantikve la kazaĥoj pasigis grandan parton de sia vivo sur ĉevalo, kaj rigardis ĉevalon siaj "flugiloj". Ilia ĉefa okupo estas brutobredado. Dum alternado de la sezonoj ili 3-4-aŭ eĉ 7-8-foje transloĝiĝas de unu gresejo al alia. Kaj tiam ĉevalo estas ilia plej taŭga trafikilo. Ili rajdante vizitas amikojn, bazon kaj vendejon. La tradiciaj vestoj de la nacio estas tre lozaj por faciligi rajdodon.

Kazaĥoj sin amuzas per diversaj ludoj kun ĉevalo kiel la ĉefa rolulo. Tio ja estas la karakteriza trajto de la nacio. La plej ŝatataj el la ĉevalaj ludoj estas rajdkonkurso, kaprokupto kaj persekuto far knabino.

La partoprenantoj de kaprokupto devas esti kuraĝaj rajdistoj, kaj la ĉevaloj — elitaj. La sukceso de la kaprokupto dependas de forto kaj sagaco.

Antaŭ la konkurso la kapro devas esti senkapigita kaj la ezofago firme ligita. Je la komenco de la konkurso grandaĝulo metas la kapron en la mezon de la herbejo, kaj la konkursantoj atendas je certa distanco de la kapro. Kiu fine kaptos la kapron kaj ĵetos ĝin en la difinitan lokon, tiu estos la gajninto.

Persekuto far knabino estas originala ĉevala sporto de la kazaĥoj. Paro da gejunuloj ekrajdas al la difinita celloko. Dum rajdado la junulo povas gaje ŝerci kun la kune rajdanta knabino aŭ esprimi al ŝi sian amon. Dume la lasta neniom devas koleri. Sed kiam ili revenas de la difinita loko, la knabino strikte postkuras la junulon. Se ŝi kuratingos lin, ŝi povos vipi lin por venĝi sin kontraŭ lia ŝerco.

Kiam tiuj amuzoj okazas, la kutime kvietaj stepoj tuj boliĝas de granda gajejo.

## MANĜAĴOJ PLENJ DE LOKAJ GUSTOJ

Apud la Konfucea Templo en Nankino estas restoracio "Vesperkrepusko", en tipa arkitekturo de Ming-dinastio (1368-1644) kaj Qing-dinastio (1644-1911). En tiu konstruaĵo oni liveras bankedon el desertoj plenaj de lokaj gustoj kaj la restoracio estas frekventata de multe da ĉinaj kaj eksterlandaj gastoj.

Nun la menuo de desertoj de la restoracio "Vesperkrepusko" konsistas el pli ol 80 specoj da manĝaĵoj.

La bezonataj materialoj de la desertoj estas ordinaraj, sed la prilaborado estas tute fajna. Ekzemple la soja ovo en la menuo estas spicita per ok specoj da spicaĵoj kaj kuirita 4 horojn super malforta fajro. La alia karakterizaĵo de la manĝaĵoj de la restoracio estas "delikateco";

kaj la desertoj kaj la servicoj, ambaŭ estas delikataj. Ekzemple la ujo por la soja ovo estas en grandeco de unu kokovo. La servicoj de la restoracio estis faritaj de la renomaj lokaj porcelanaj fabrikoj.

Prezertante ĉiun deserton, la kelnerino konigas al la gastoj popolrakonton korelativan kun la deserto.

## EKSPONA ORANĜERIO EN LA PEKINA BOTANIKA ĜARDENO

En la Pekina Botanika Ĝardeno inaŭguriĝis lastatempe bela oranĝerio subportata per fortika korodimuna manganŝtala materialo. Ĉiuj vitropecoj kun totala areo de 20 000 kvadratmetroj estas kunligitaj per ungoformaj ligiloj.

En la oranĝerio estas 6 sendependaj kaj korelativaj medioj: kvarsezona ĝardeno, tropika pluvarbaro, dezerta vegetalaro, orkideo-ananaso-insektovorulo, altebenaja vegetalaro kaj ombrovegetalaro. Ĉiu de la 6 medioj estas konforma al la natura ekologio. Tie kreskas 60 000 vegetaloj de 3 100 specoj de diversaj partoj de la mondo.

En la ĉambro de tropika pluvarbaro regas granda humideco kaj sufoka varmo. Ĉu floroj kaj herboj, ĉu rampaĵoj kaj altaj arboj, ĉiuj okupas por si lokon en la spaco. Intermiksiĝante, iliaj branĉoj kaj foliaroj dense ŝirmas kontraŭ la suno. Tie kreskas multaj kuriozaj vegetaloj, ekzemple spinuloso (*Cyathea spinulosa*), speco de pteridio samaĝa al dinosaŭro antaŭ 350 milionoj da jaroj, ora kamelio

honorita kiel "pando en vegetala regno", upasarbo, "mistera frukto" longe dolĉiganta la langon...

En la ĉambro de dezertaj vegetaloj kreskas pli ol 1 000 specoj da kakttoj kaj sukozaj vegetaloj. Tie kreskas ankaŭ unuopa kaj pluropa ekinokakto, la plej granda en la mondo, kolosa opuntio 15 metrojn alta kaj kelkajn tunojn peza. Ĝia granda radikaro povas ensuĉi unufoje tunon da akvo kaj kreskas tre malrapide, nur 1 metron en 30 jaroj.

Estas malfacile krei 6 specojn de klimatoj en la sama oranĝerio. En la kvarsezona ĝardeno la taga temperaturo devas esti 18-19° C, kaj la humideco — 60 %. Sed en la ĉambro de tropika pluvarbaro la minimuma temperaturo devas esti 21° C, dum la humideco — 70-80%. Ĉio ĉi estas regata aŭtomate.




En la oranĝerio de la Pekina Botanika Ĝardeno



"Ho, bongustaj kandizitaj kratag-fruktoj!"

# Amo de maljuna usonano al Ĉinio



Ludo de volano



Younise Brook





Najbaro vizitas ŝin.



Ŝi rete korespondas kun siaj gefiloj, kiuj vivas en Usono.

Teksto kaj fotoj de XU XIAORAN

Novembre de 1999 la 83-jara usonano Younise Brook enloĝiĝis en malgranda vilaĝo de la urbo Liaocheng, Shan-

dong-provinco, Ĉinio. Sciante la historion de ŝi, la lokanoj afable akceptis ŝin.

En la komenco de la 20-a jc., ŝiaj gepatroj venis prediki en Beidaihe kaj donis al ŝi,

kiu naskiĝis en Ĉinio, ĉinan nomon Mu Lin'ai. Poste ŝia tuta familio transloĝiĝis en Liaocheng, kaj tie Mu Lin'ai vivis 13 jarojn. Tiam ŝin profunde impresis la diligente-



Ludo kun infanoj en elementlernejo

● ORDINARAJ ĈINOJ



Veturo per aŭtobuso

Younise Brook antaŭ sia domo en la vilaĝo





Studentino konsultas ŝin en ŝia hejmo.



En foirejo.

co kaj afableco de la ĉina popolo kaj, kompreneble, ankaŭ la malriĉeco kaj postĝinteco de Ĉinio.

En 1930 ŝi revenis kune kun siaj familianoj en Usonon. Sed ŝia amo al Ĉinio ne paliĝis malgraŭ tempopaso kaj ŝi edziniĝis nur al tiu, kiu konsentis vivi kun ŝi en Ĉinio. Kvankam ŝi ne povis realigi sian deziron dum longa tempo pro historiaj kaŭzoj, tamen Ĉinio rapide disvolviĝanta, kiu sin liberigis el malriĉeco kaj postĝinteco, multe ŝin altiris al si. Post kiam ŝia edzo forpasis en 1998, ŝi, pli-ol-80-jara, vendis sian vilaon kaj aliajn havaĵojn, adiaŭis siajn gefilojn kaj finfine realigis, helpate de la koncernaj departementoj de Ĉinio, sian deziron — fariĝi honora vilaĝano de Ĉinio.

# Pri elektroprovizado en Makao

S-ro Miao daŭrigis: "Malgranda Makao ne povas enteni multajn elektrokompaniojn, kaj nia kompanio funkcias ekskluzive."

de YANG KA

**M**AKAO estas orienta urbo plena de folkloraj kaj aliaj allogaĵoj. Ĝi povus havi neniun industrion, sed absolute ne elektran industrion. La elektra industrio de Makao estas "miniatura", sed ĝi reflektas la kunfandiĝon de orienta kaj okcidenta administracia maniero kaj ankaŭ la limigon de la tereno al la disvolviĝo pro la malgrandeco. Tamen tie oni povas percepti ankaŭ kvietecon kaj senstreĉitecon.

## EKSKLUZIVA ELEKTROKOMPANIO

Dekkelke da minutoj jam sufiĉas por aŭte traveturi du trionojn de la tuta Makaa duoninsulo, la ĉefa parto de Makao. Kaj nur en tiu momento ni konsciis la malgrandecon de Makao.

Venante al la Makaa Elektrokompanio ni rimarkis, ke pro sia malgrandeco Makao ne sole postulas ke oni racie utiligu ĉiun colon da tero. La kompanio posedas generatorojn kun totala kapacito de 360 miloj da kilovattoj, sed nur 777 laboristojn. S-ro Miao Jingcheng, prezidanto

de la direktoraro, diris al ni: "En komparo kun la elektrokompanioj de la landinterno, nia kompanio estas tre malgranda." Vere en la landinterno estas sennombraj elektrejoj ĉiu kun generatora kapacito de pli ol miliono da kilovattoj, kaj en elektrejo kun generatora kapacito de dekmiloj da kilovattoj ja laboras pli ol mil homoj. S-ro Miao daŭrigis: "Malgranda Makao ne povas enteni multajn elektrokompaniojn, kaj nia kompanio funkcias ekskluzive." Kaj ni tuj identigis la "ekskluzivecon" kun "monopolo". "Ĉu ekzistas konkurenco pro 'ekskluziveco'?" nature ni ekhavis dubon. "Tro multa konkurenco en malgranda Makao kaŭzus grandan malŝparon. La ekskluziva kontrakto subskribita kun la registaro multe limigas nian kompanion, kaj la procentaĵo de la kapitala rekompenco estas 14%. Tamen la kompanio tre domaĝas la aŭtentikigitan ekskluzivecon kaj tenis la stabilecon de la elektra prezo en la lastaj 14 jaroj sub la permesita kondiĉo pro la inflacio en Makao. Dum multaj jaroj ni gajnis profiton pere de reduktado de investo kaj altigo de efiko."

Ni estis informitaj, ke antaŭ 12 jaroj la registaro de Makao

jam forlasis la akcian regadon super la elektrokompanio kaj posedas nur 7.7% da ĝiaj akcioj. La Ĉina-Franca Investa Kompanio kaj la Ĉina-Portugala Investa Kompanio posedas po 45% da ĝiaj akcioj kaj lokaj individuoj — 2.3%. En 1999 la neta profito de la elektrokompanio estis 450 milionoj da juanoj (8.27 juanoj egalas al unu usona dolaro).

## NEINDIFERENTA "GRANDA" ELEKTREJO

Makao havas tri elektrejojn, kaj du el ili estas tre malgrandaj kaj ilia elektroprovizo konsistigas malpli ol 10% de la totala elektroprovizo en Makao. Kaj la tria elektrejo Coloane estas tre "granda", ke ĝi provizas Makaon per pli ol 80% de la bezonata elektro. Tiu tre "granda" elektrejo situas sur la plej suda insulo Coloane, unu el la tri insuloj de Makao.

La totala generatora kapacito de la elektrejo estas 265 mil kilovattoj kaj ene servas 176 homoj. Elektrejoj kun tia generatora kapacito estas tre ordinaraj en la ĉeftero, sed por Makao tia kapacito estas tute neindiferenta. En la elektrejo estas malgranda eksponejo, en kiu oni



La elektrejo Coloane

povas informiĝi, kian kontribuon la kompanio faris de post 1978. "Ni portas sur ni grandan respondecon," kun fiero diris la mastro. "Komprenoble ni sentas premon. La registaro instigas investi por entrepreni elektrejojn, sed la kompanio montris grandan intereson aĉeti elektron de la elektra reto de Guangdong-provinco."

Ni rimarkis, ke la elektrejo konsumas ne karbon, sed oleon. Por garantii la purecon de la eluzita akvo enlasota en la maron, la elektrejo fluigas la eluzitan akvon unue en cistemon, kie oleo povas disiĝi de akvo. La reprenita oleo povas esti utiligata refoje kiel hejtaĵo, kaj la acida eluzita akvo estas ellasita en la maron post neŭtrigo kaj senigo je solidiĝo.

"Makao estas krampita de la maro en tri flankoj, kaj la spaco por nia ekzisto estas tre malgranda. Tial ni tre domaĝas nian spacon, kio eble estas malfacile imagebla por vi. La marakva malvarmiga sistemo de la generatoraro ja estas konstruita sur la tero kreita de polderigo." Evidente la polderigado en la lastaj cent jaroj estis devigita de la realo.

## NEMALHAVEBLA RUBO-ELEKTREJO

400 mil loĝantoj faras la malgrandan Makaon interprema, tamen turismo allogas senombrajn turistojn, do Makao fariĝis la plej dense loĝata loko en la mondo. Jen problemo: Makao jam ne havas lokon por enterigi rubon.

En 1992 estis lanĉita rubo-elektrejo, al kiu la registaro investis 550 milionoj da makaaj dolaroj kaj disponigis 40 000 kvadratajn metrojn da tero.

Ĉiutage la elektrejo forbruligas 600 tunojn da rubo de la urbo, kaj tio turniĝas en 200 mil kilovattorojn da elektro. 70% de la elektro estas vendata al la Makaa Elektrokompagnio kaj la cetera elektro estas uzata de la

elektrejo mem. Kvankam la vendata elektro konsistigas nur 3.3% de la bezonata elektro de Makao, tamen la elektrejo mem estas nemalhavebla por la sana vivo de la makaanoj.

La mastro diris al ni, ke dum la tuta procedo oni laboras en fermita spaco, sen kontakto kun la rubo.

"Ĉu bruligado de rubo ne postlasas ankaŭ rubon?"

"Jes. Tial ni plene bruligas la rubon, por ke la restaĵo de la bruligado estu maksimume malmulta. Ni eltiras metalojn per magneto, kio donas al ni ĉiujare 3 800 tunojn da metaloj vendeblaj. La fina restaĵo el bruligado estas nur 350 kilogramoj por ĉiu jaro kaj estas uzebla por polderigado kaj voj pavimado."

## LABORSINDIKATO AMATA DE LABORISTOJ

S-ro Ruan Yuming, iom pli ol-50-jara, altastatura, ĉiam havas rideton sur la vizaĝo. Li estas delegito de la Makaa Elektrokompagnio pri la akuzoj de klientoj. Post laboro li estas prezidanto de la laborsindikato de akvo- kaj elektroprovizado. Li diris: "Mi laboris jam 35 jarojn por la sindikato kaj funkciis kiel ĝia prezidanto dum multe da jaroj. Mia prezidanteco estas donita de la tuta membraro de la sindikato kaj senpaga."

S-ro Ruan diris: "Niaj laboristoj kaj iliaj familianoj ĝuas senpagan kuracon, kaj la gefiloj de la laboristoj ĝuas tion ĝis 18-jariĝo. Ĉiu laboristo ĝuas senpage 6 000 kilovattorojn da elektro. Ĉe emeritiĝo oni ricevas la tutan pension, dum la aliaj bonstatigaj kondiĉoj restas senŝanĝaj. La meznombra monata enspezo de makaaj laboristoj estas 7 000 makaaj dolaroj, dum tiu de la elektroprovizaj laboristoj estas pli ol 10 000. La bonstatigaj aferoj de la Makaa Elektrokompagnio estas la plej bonaj en Makao."

S-ro Ruan kontentas pri tio, ĉar tio estas rezulto de klopodado de la sindikato dum multe da jaroj. Laboristoj de la elektrokompagnio tre domaĝas sian staton, kaj ili ĉiuj laboras sincere kaj devokonscie. Dum multaj jaroj



La Makaa Elektrokompagnio

la kompanio eksigis neniun laboriston.

La sindikato havas tre bonajn interrilatojn kun la direktoraro. Ĉiujare la kompanio disponigas al la sindikato 100 mil makaajn dolarojn por subteni ĝian aktivadon, ĉar la gvidantaro de la kompanio bone konscias, ke la harmoniaj interrilatoj estas utilaj al ambaŭ flankoj. Konfliktoj inter ambaŭ flankoj estas solvitaj ofte pere de intertraktado, interkompreno kaj reciproka subteno. La direktoraro de la kompanio bone scias, kian lokon la laborsindikato okupas en la koro de la laboristoj. Kiam la kompanio havas problemon, la direktoraro sin turnas al la laboristoj pere de la sindikato por peti ilian helpon, kaj la sindikato multe helpas la kompanion. Tamen la sindikato neniam cedas en problemo rilate principon. Ekzemple, foje la direktoraro de la kompanio opiniis, ke la kompanio tro multe pagis por la kuraco de la laboristoj kaj iliaj familianoj, kaj intencis fari ian ŝanĝon. La sindikato komprenis la aferon kaj montris simpatian, sed ne konsentis la ŝanĝon, ĉar la sindikato devas persisti sur sia starpunkto, nome senkondiĉe defendi la interesojn de la laboristoj. ■

# Amatoro de ekspediciado

*Vivo de junuloj estas kolorriĉa, kaj en la hodiaŭa plurisma socio, junuloj havas pli multe da ŝancoj por fari sian ŝatatan aferon, ekzemple eliri el la urbo kaj havigi al si tute malsaman sperton en montoj kaj ĉe riveroj. Zhu Jing estas amatoro de ekspediciado, ŝi ŝatas ion skribi por noti sian neforgeseblan vojaĝon.*

Yu Tao

Teksto kaj fotoj de ZHU JING

**N**UN mi bildigu ekspedicianojn: en montogrimpaj botoj, larĝaj kaj dikaj vestoj, kun dorsosako plenigita de necesaj objektoj.

Mi jam estas veterana ekspediciano. Ekde 1994, en 6 jaroj mi foj-refoje vojaĝis kunportante la sakon. Kiam mi prenis okupon, mi havis multan ŝancon vojaĝi en someraj kaj vintraj ferioj, kaj tiam mia plej granda espero estas travojaĝi montojn kaj riverojn kunportante mian sakon.

## UNUA PROVO

Hodiaŭ mi ankoraŭ memoras mian unuan ekspediciadon. Kun

ekipaĵo ĉirkaŭ 20-kg-peza, mi piediris 100 km en 3 tagoj kaj trairis la monton Wuling oriente de Pekino.


En Wuling-monto arbaro densas, sovaĝaj bestoj riĉas kaj malmulte troviĝas homaj signoj. La monto ja estas ideala loko por ekspediciado. Tie ne troviĝas vojoj, ĉie murmuris rivereto, rokoj kaj falintaj arboj estas tegitaj de densa musko. Ni zorgeme supreniris stumblante kaj tangante. La vojo zigzagis. De tempo al tempo aŭdiĝis "pum", certe iu falis. Mi falis, kaj vi, kaj li. Ne gravas. Ĉar fortaj manoj, zorgemaj rigardoj kaj varmaj vortoj helpas vin. Kiam vi veos antaŭ vertikala deklivo, akompanantoj helpos vin. Jam per la kvar membroj mi grimpis kaj tiamaniere mi atingis la krutaĵon. Malsuprenirante mi

eĉ prenis glitludon kiel rimedon. En ripozejo, bivakfajro brulis, apude aŭdiĝis "Auld Lang Syne", estis la plej bela momento de la vespero. En gajo kaj pasio ni ĉirkaŭis la bivakfajron kaj manĝis varman nudelon. Ni starigis tendojn kolorriĉajn, kaj haste enigis nin en dormosakon. En la sekvanta tago ni venis al la montpinto por rigardi sunleviĝon. La leviĝanta suno beligis la mondon, ankaŭ la sunmalleviĝo instigis penson kaj imagon. Tio estas ne spertebla en urbo. Reveninte hejmon la ekspedicianoj diris, ke ili neniam spertis tian intimecon inter personoj, kaj konsciis, ke malfaciloj estas tiel malgrandaj. Ni amikiĝis al la naturo, dank' al firma volo, forta unuiĝo, simpla amo kaj interkompreniĝo. Estas naturo, kiu dotis nin per temperamento vasta kiel montaro kaj vekis en ni la amon.

Kiam ni refoje ekiris al montvojaĝo, malfortiĝis scivolemo, tamen fortiĝis intereso pri ekspediciado.

## ETENDIĜO DE INTERESO

Nun amatoroj de ekspediciado en Pekino starigis klubojn unu post alia: Shanye-klubo, Yanjie-klubo de Vivado en Sovagejo, Yuanfeiniaio-klubo de Tendumo..., ĉiuj tenas la celon "ni kune iru en la naturon, pere de komunikado kun la naturo ni serĉu veran sencon de la vivo. Ni heredu kaj kreu flavan civilizacion pere de nia vigla



Antaŭ ekiro



Pikniko

vivo". Fraŭlino Gao, fervora partoprenanto de ekspediciado, diris, ke sportado en sovaĝaj kampoj ne nur hardis ŝin, sed ankaŭ spertigis al ŝi ĝojon de reciproka helpado inter homoj. Nun furoras sportoj kaj ludoj: rokogrimpado, glisflugado, subakviĝado, *Bungy-ludo*..., ju pli stimula, des pli plaĉa. La gazetoj "Ekspedicia Ilustraĵo", "Notlibro por Vivo", "Scioj pri Eskapo el Danĝeroj", "Sovaĝa Montkampo" k.s. estas bonvenaj al ekspedicianoj. Ĉe semajnofino, per telefono, tiuj ekspedicianoj kolektiĝis kaj sin ĵetis al la naturo.

Kiel ekspedicianoj, kiam ili ĝuas la naturon, ili devas ofte iri sur ŝtona aŭ kota vojo, eĉ en neĝo. Do por ili estas nemankigeblaj tiuj: tendo, dormosako, botoj kaj sako speciale por grimpadado, akvopurigilo, kompasoj kaj pošlampo. Ili emas "laŭeble ŝpari monon sed plej multe vojaĝi", kaj en la urbo unu post alia aperis butikoj Chitu, Xueniao, Sangwente..., kiuj speciale vendas ekspediciajn necesajojn. En tiaj butikoj, ofte en la centro staras tendo kaj ĉie prezentigas ekipaĵoj kaj objektoj: De alumeto ĝis tendo, kaj necesaj objektoj kaj profesiaj ekipaĵoj por rokogrimpado, neĝmontogrimpado kaj eĉ por kajako. Kaj tiuj faras la atmosferon instigi vin eniri en la naturon. Pere de tiuj

profesiaj ekipaĵoj amatoroj ekspedicias kaj brakumas la naturon kaj ankaŭ spertas la sencon de la vivo.

Kiam vi posedas la naturon, via vivo estas bela. Kiam vi estas en sufoko, en ĉagreniĝo aŭ malĝojo, iru en la naturon, kunportu la stelojn kaj aŭskultu zumadon de insektoj, kaj vi kvietigos.

Bezonaĵoj de ekspedicianoj:  
Ekipaĵoj: tendo (portebla

domo), dormosako, akvimuna litkuseno, pneŭmata kuseno, alpismaj botoj kaj sako (por enteni necesajojn), kuiriloj (kuirejo de ekspediciado), akvopurigilo kaj kompasoj.

Vestoj: varmkonservaj kaj glitrezistaj botoj; 2-3 paroj da dikaj ŝtrumpoj, kiuj povas protekti viajn piedojn kontraŭ malvarmo; du maldikaj lanvestoj (du maldikaj estas pli varmenaj ol unu dika) kaj facile sur- kaj demetebaj; ventorezista jakoj; lana aŭ vatita pantalone, ankaŭ facile sur- kaj demetebla, ĉar dum sportado vi varmiĝos sed malvarmiĝos tuj post ĉeso de sportado.

Manĝaĵoj: altkaloriaj manĝaĵoj, patkuko, bovaĵo, ovo, ĉokolado kaj butero, kiuj rapide donas kalorien.

Kunportaĵoj: mapo, pošlampo, fotografilo, binoklo, fajrilo kaj necesajoj por ĉiutaga lavado, kiuj devas esti malgrandaj, fortikaj kaj facile portebaj; ŝmiraĵo por protekti la haŭton kontraŭ la vento. ■

### ABONKOTIZO DE *EL POPOLA ĈINIO* POR 2000

| Lando       | Valuto | Abonprezo | Sendokosto | Pagenda sumo |
|-------------|--------|-----------|------------|--------------|
| Aŭstralio   | AUD    | 19        | 24         | 43           |
| Brazilo     | USD    | 12        | 6          | 18           |
| Bulgario    | USD    | 10        | 6          | 16           |
| Britio      | GBP    | 10        | 12         | 22           |
| Eŭro-landoj | EUR    | 12.80     | 16         | 28.80        |
| Francio     | FRF    | 84        | 108        | 192          |
| Germanio    | DEM    | 24        | 32         | 56           |
| Italio      | ITL    | 24000     | 30800      | 54800        |
| Japanio     | JPY    | 1700      | 2160       | 3860         |
| Nederlando  | NLG    | 28        | 35         | 63           |
| Usono       | USD    | 14        | 18         | 32           |
| Vjetnamio   | USD    | 10        | 6          | 16           |

1. Ĉiuj evoluintaj landoj ne menciitaj supre pagu kiel Usono aŭ Nederlando.

2. Meksikio, Singapuro kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko pagu kiel Brazilo; ankaŭ Hongkong pagu kiel Brazilo.

3. Ĉiuj landoj en Azio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj ne menciitaj supre pagu kiel Bulgario.

4. La 11 EU-landoj kun eŭro kiel komuna mono povas pagi ankaŭ kiel Eŭro-landoj.

Por aera sendo bonvolu nepre aldoni 18 USD aŭ valoron egalan al la pagenda sumo.

# Se memoro povus engreftiĝi

*Denove julio, monato zorgoplena pro la enira ekzameno de superaj lernejoj en Ĉinio. Kaj por tio la ĉina lingvo kiel lernobjekto estas nepre submetita al ekzameno, kaj la verkado de artikolo estas tre grava. Ĉi-sube ni prezentu tri el la distingindaj artikoloj de la ekzamenitoj en 1999.*

La Red.

de PING HUA

Pri temo de la verkado:

Post sukceso en greftado de homaj korpoptoj, sciencistoj ekfari esploradon pri greftado de memorkapablo. Ĵurnalo raportis, ke eksterlande sciencistoj jam sukcesis grefti memoron al malgrandaj animaloj. Ilia esplorado pruvis: kiam oni greftos ian kemian materion, en kiun oni enmetis la programigitajn informojn, ankaŭ la memoro estos transigita. Sendube greftado de homa memoro estas multe pli malfacila ol tiu de la

besta, kaj eble tio neniam sukcesos. Sed iuj sciencistoj kredas, ke tio sukcesos en la estonteco. Se memoro povus engreftiĝi, kion vi volus fari?

Do bonvolu verki artikolon pri la temo "Se memoro povus engreftiĝi". Kelkaj atentigoj: 1. komplete liberigu vian imagon, kondiĉe, ke la enhavo estu rilata kun "Se memoro povus engreftiĝi", kaj vi povos teksti rakonton, ekspliki vian opinion kaj disvolvi perspektivon; 2. La titolo de la artikolo estu decidita de vi mem; 3. Escepte de poezio, vi povos uzi ĉiujn formojn por via artikolo kun almenaŭ 800 ideogramoj.

## Savo far Marso

"UFA raportas al la ĉefstabo: Mi jam atingis la lokon 301, sed ne trovis la celon. Mi petas instrukcion."

"Priserĉu pli atente. La oriento estas ĝusta. Tio estas blua planedo kun forta signalo de vivo."

Post tri minutoj. "Raporton al la ĉefstabo: Mi jam trovis la celon, sed ĝi fariĝis nigra, la signalo estas atenuiĝanta."

"Tuj surteriĝu kaj alportu du terloĝantojn. Tuj efektivigu nian planon de savo de la terglobo."

Tio okazis en la jaro 3008. Pro la serioza poluado la planedo nomata "tero" frontas pereon. La marsanoj komencis sian planon de savado.

"Raporton al la ĉefstabo: UFA jam pace revenis kun du terloĝantoj, ĵus perdintaj la signalon de vivo."

"Tuj portu ilin en la analizejon kaj greftu ilian memoron al la roboto-marsanoj n-roj 2 kaj 3. Mi volas scii,

kiel la malgrandaj terloĝantoj propramane pereigas sian planedon." La ĉefmarsano venis al la "simula terglobo sistemo" kaj vidis, ke la roboto-marsanoj n-roj 2 kaj 3 kun greftita memoro komencis la pereigon. N-ro 2 venis en arbaron kaj svingadis hakilon en la mano. Je lia laboro arboj falis unu post alia. Tio malordigis la komputeran ekvilibriĝan sistemon de Marso, kaj la simulita superakvo falis de sur la ĉielo. Okazis ja neimagebla afero. N-ro 3 miksis segaĵojn kun kalko por uzi ilin kiel cementon kaj per ĝi konstrui digon kontraŭ la superakvo. Sed la akvego facile forpuŝis la digon kaj inundis la kamparon... "Neimageble, neimageble! Kiel ili povas tiel fari? Tuj, tuj haltigu la simulitan akvegon. Rigardu, kion ili daŭre faros?" La ĉefmarsano kriegis de kolero, kaj la apenaŭ saviĝintaj roboto-

marsanoj n-roj 2 kaj 3 rigardis unu la alian kun ekrido. Unu el ili levis laseran pafilon kaj ekpafis al la "elektronikaj birdoj" kaj la alia malfermis la kloakojn kaj enlasis en maron la forĵetitajn plumbon kaj hidrargon! Post ilia fuŝado la indico de la vivo de la terloĝantoj malkreskis de 500 milionoj al preskaŭ nulo!

"Terure, terure!" la ĉefmarsano kapskuis kun bedaŭro. Ĝi premis la butonon de la giganta ekrano por fari indikon de plua agado laŭ la plano. "UFB tuj flugu super la maron kaj disŝutu la 'Vivon n-ro 1'! UFC flugu super la regionon G kaj disŝutu 'Vivon n-ro 2'! La marsa hospitalo estu preta lavi la cerbon de la terloĝantoj kaj grefti al ili la filtritan memoron, por ke ili forgesu la terurajn fiagojn, reiru al la terglobo kaj kreu novan vivon!"

Pasis jaroj.

"Raporton al la ĉefstabo: UFA jam atingis la lokon 301. Ĉi tie estas blua planedo, kaj tre forta estas la signalo de vivo!" Tion aŭdinte, ĝoje ekridis la ĉefmarsano...



## Viva de du homoj

Forpasis geedzoj, kiuj kune pasigis pli ol 60 jarojn plenajn de feliĉo kaj malfeliĉo. Kiam ili vivis, ilia plej arda deziro estis ankoraŭ esti geedzoj en la venonta vivo, kaj ili faris interkonsenton, ke ili renkontiĝu sub iu arbeĝo en la "Feliĉa Parko" je la sepa vespere de la 7-a de la sepa monato laŭ la ĉina luna kalendaro de la 2010-a jaro. Laŭ ilia testamento, iliaj infanoj greftis ilian memoron al paro da 12-jaraj geknaboj.

Rapide pasis 10 jaroj kaj la du geknaboj jam plenkreskis. Ili venis laŭ la interkonsentita horo al la difinita loko, sed ili ne konis unu la alian, ĉar la aspekto de la atendato en ilia memoro ne estas tia kian ili vidis nun.

Ambaŭ sidiĝis kaj atendadis

de mateno ĝis vespero kaj de vespero ĝis mateno, sed "li" kaj "ŝi" en ilia memoro ne aperis. Pasis jaro post jaro, kaj ili firme kredis je sia interkonsento kaj persiste atendadis. De juneco ĝis mezaĝo, sulkoj kaj grizaj haroj aperis nerimarkite, sed ili ankoraŭ persistis en atendado. Ili nenium vorton diris unu al la alia, ĉar ili estis fidelaj al la interkonsento kaj atendis aperon de sia amato.

Baldaŭ forpasis ankoraŭ 60 jaroj, la foliaro de la granda arbo velkis kaj reverdiĝis multfoje, kaj la du grizharaj maljunuloj daŭre atendis silente. Ŝi forpasis, kaj li, ŝia unika najbaro, pritraktante ŝiajn postlasitaĵojn, rimarkis leteron. Li legis ĝin kaj ekploreĝis unuafoje

en la 60 jaroj, antaŭ kiu li neniam larmis. Li levis ŝian korpon kaj la plorego laŭtis kiel tondro. Hurlis vento, kaj li sentis triston legante "Greftu mian memoron al knabino, kaj en alia vivo mi ankoraŭ atendos lin ĉi tie." Li legis kaj relegis la leteron. Subite li ĵetis la leteron en la venton, kaj tiu tuj malaperis sen postsigno. Li ne volis misuzi la vivon de paro da geknaboj. Li bedaŭris, kial atendi alian vivon? Li sentis doloron kaj decidis agi denove. Se ekzistas antaŭdestino, ili certe renkontiĝos.

Kiam li kvietiĝis, li skribis al la posteuloj: "Grefti memoron povus esti feliĉiga afero, sed mi malŝparis la karan tempon. Saĝaj homoj, ne imitu min, sed utiligu la greftitan memoron por lernado, laborado kaj kreado de sociaj riĉaĵoj."

Fininte la skribon, la maljunulo por ĉiam perdis la memoron, sed la okuloj restis malfermitaj...

## Nova biografio de Donkiĥoto

Sanĉo kaj lia mastro s-ro Donkiĥoto kaj ties amikoj venis en la nunan mondon. Sanĉo estis ĉagenita de la frenezeco de la mastro. Li aŭdis, ke en la nuna mondo oni povas grefti memoron, kaj ĝojiĝis, ke grefto povos forigi al Donkiĥoto la memoron pri kavaliro. Brile sukcesis la operacio de grefto.

La unua vorto de Donkiĥoto post vekigo estis: "Kie estas mia komputero? Venigu mian sekretarion." Gapiĝis Sanĉo, ĉar li ne rekonis la novan Donkiĥoton: Oni greftis al Donkiĥoto la memoron de Bill Gates, komputera genio.

En bedaŭro Sanĉo eskortis sian mastron al la hejmloko.

Donkiĥoto ne persekutis ŝafgregojn, nek stulte batalis kontraŭ la ventomuelilejo, sed tuttage cerbumadis super ekspluato de komputero. Liaj amikoj venis viziti lin. Sed kiam ili vidis lin, ĉiuj estis teruritaj:

Donkiĥoto portis nigran jakon kun brilaj aĵoj (fakte nur butonoj), ŝuojn sen tibiingo. Ĉiuj miris, kaj Sanĉo klopodis por klarigi al ili, sed ili fariĝis pli konfuzitaj. "Kiel kapablaj estas la nuntempuloj, ke ili inventis komputeron kaj interreton, kaj en hejmo oni povas scii ĉion en la mondo. Kaj nun ili greftis al nia Donkiĥoto la memoron de Bill..." Lian klarigon sekvis

suspiro kun admiro.

La nova Donkiĥoto sentis honoron. Li diris vorton post vorto: "Estimataj, en la estonteco, por konformigi nin al la bezono de la tutgloba informadiko, mi konsilu al vi lerni komputerikon, kaj mi instruos vin senpage..." Je tio disiĝis la homgrupo en brua ridado. Donkiĥoto sentis miron kaj Sanĉo — bedaŭron.

En la postaj tagoj Donkiĥoto facile eksplodis de kolero, postulante de Sanĉo jen softvaron, jen sekretariinon, jen materialojn pri komputero... Tio multe embarasis Sanĉon. Post longa longa konsiderado Sanĉo decidis restarigi al Donkiĥoto la originan memoron.

Kaj nun sur polva vojo denove galopis magra ĉevalo kun la antaŭa Donkiĥoto kun longa lanco sur la dorso. Jen Donkiĥoto post reenmeto de la origina memoro.

# Saniga gimnastiko de Shen Junru (1)

de YANG SHENG

**S**-RO Shen Junru (1875-1963) estis fama ĉina socia aktivulo. Sube estas la de li inventita kaj praktikata saniga gimnastiko. Dank' al sia longdaŭra praktikado li sane vivis 88 jarojn. Nun tiu gimnastiko estas bonordigita kaj disvastigata de koncerna departemento.

I. Movo de la talio. Staru rekte kun la du piedoj disigitaj je la distanco, kia tiu de la ŝultroj. Tenu la du manojn ĉe la talio aŭ nature pendantaj. Turnu vin dekstren kaj




maldekstren kelkajn fojojn (Bildoj 1, 2 kaj 3).

II. Svingo de la piedoj. Staru rekte sur unu piedo. Nature kaj facile svingu la alian piedon internen kaj eksteren. Faru tion per la du piedoj alterne plurajn fojojn (Bildoj 4 kaj 5).

III. Parada paŝado. Post la supre diritaj movoj marŝu antaŭen



per paradaj paŝoj, ĝis vi ŝvitetos (Bildoj 6 kaj 7).



IV. Froto de la piedoj. Sidu en lito kun la du kruroj interkrucitaj kaj unu piedo sur la alia femuro. Per via manplato frotu piedkavon kaj kalkanon plurajn fojojn ĝis varmiĝo kaj per la alia frotu tiujn de la alia piedo (Bildo 8).




V. Froto de la lumboj kaj koksostoj. Per viaj du manplatoj frotu viajn lumbojn kaj koksostojn



plurajn fojojn (Bildo 9).

VI. Froto de la dorso kaj lumboj. Metu viajn manplatojn ambaŭflanken de la spino kaj forte puŝu viajn ok fingrojn (escepte de la du dikfingroj) maksimume supren kaj poste puŝu ilin malsupren plurajn fojojn (Bildo 10). Faru tion kelkajn fojojn.



VII. Froto de la spino. Premu per viaj du manoj la spinon kaj forte puŝu la montran, mezan kaj ringan fingrojn maksimume supren. Puŝu ilin malsupren ĝis la kokcigo. Haltu momenton kaj daŭrigu la frotadon kelkajn fojojn (Bildo 11).



VIII. Froto de la subventro. Frotu vian subventron per viaj dekstra kaj maldekstra manoj alterne plurajn fojojn (Bildo 12). Tio estas utila al facila cikulado de la vitala energio en la korpo kaj plezurigo.



# Memore al la signifoplenaj eventoj

La 1-an de julio, 1997, kaj la 20-an de decembro, 1999, la ĉina registaro restarigis sian suverenecon super Hongkong kaj Makao. La ĉina popolo realigis sian deziron repreni Hongkong kaj Makao. Tiuj du specialaj administraj distriktoj de la Ĉina Popola Respubliko praktikas la politikon "unu lando, du sistemoj". De tiam ili eniris en la novan epokon de sia historio.

Memore la revenon de Hongkong kaj Makao en la sinon de la patrio, la Ŝtata Poŝta Administracio emisiis du orumitajn miniaturnajn pecojn kaj la Ĉina Ĝenerala Filatela Kompanio — memoran faldfolion.





Vojaço tra dezerto

Foto de XIN TIANBIAN

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》二〇〇〇年第七期  
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2